


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ joulukuu ♦ decembro ♦ 6/2001



Aŭtunaj Tagoj, p. 5

Esperantokurssi Internetissä, s. 11

Oficistoj transiros, p. 18

- Osmo Buller al Pääntalo-instituto
- Trevor Steele al Centra Oficejo

FEJO multe kontribuis por la programo de Aŭtunaj Tagoj 2001: Sur la scenejo la teatra grupo "Variantoj". Dekstre Hanna Helén, sube Katja Lampinen, Eeva Vaijärvi kaj Pipsa Ahonen. (AT-fotoj: Sakari Kauppinen)



- Bonan kristnaskon kaj feliĉan novan jaron al ĉiuj legantoj -



Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 13,50 •/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 •; Baltio 10 •, aliaj landoj 13,50 •.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 3313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Sekretario/Sihteeri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Heikkinen, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ anna-liisa.heikkinen@sci.fi

Esa Lång, Lokinkatu 5, 15610 Lahti. ☎ (03) 735 2723

Päivi Saarinen, Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raitapy@jymy.kase.fi

Jukka Vaijärvi, Neulapadontie 3 C 21, 00920 Helsinki. ☎ (09) 349 7334 ✉ jukka.vaijarvi@dinosoft.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Oficejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Vapaaehtoista pullaa

Kirjailija Kreetta Onkeli oli kirjoittanut mielenkiintoisen kolumnin ke 31.10.2001 Ilta-lehteen otsikolla *Kielten opiskelusta*. Kirjoittaja tunnustaa suoraan, ettei ole 9 vuotta englantia, 6 vuotta ruotsia ja 3 ranskaa opiskeltuaan yhtään kiinnostunut kielistä. Kansainvälisissä juttuseuroissa pärjää ynähtelemällä, nyökkäilemällä ja osaamalla muuttaman vakiofraasin. ”Oppilaita koulutetaan ikään kuin kielentutkijoiksi, eikä keskustelijoiksi”, Kreetta Onkeli toteaa.

Alkuvaiheen vapaa sanojen tapailu luovasti vieraalla kielellä vaihtuu pian kieliopiksi, tutuksi tulevat englannin sanajärjestys, ruotsin ja ranskan kaksi sukua, joita sitten tankataan päähän, johon pitäisi mahtua myös fysiikan, kemian ja historian perustiedot. On totta, että keskusteluharjoituksiin törmää kieltenopinnoissa vasta yliopistotasolla perustiedot kielen rakenteesta hankittuaan. Allekirjoittanut uskoo, että lasten ennakkoluulotonta ja luovaa panosta kielenoppimisessa voisi käyttää hyödyksi nivoamalla keskusteluharjoitukset ja teoriapuolen sopivasti toistensa lomaan.

Kreetta Onkeli kertoo ranskan opettajastaan, joka veti alkeetkin puhuen ranskaa, kielioppi mukaan lukien. Kertoo enemmänkin opettajan halukkuudesta puhua kieltä kuin vuorovaikutuksesta opettajan ja oppilaiden välillä. Kreetta Onkeli on tähän mennessä saanut vain kielteistä palautetta opettajilta kielten oppimistaidostaan. Eiköhän siinä vähemmälläkin usko, ettei omaa sitä maagista ”kielipäätä”, vaikka kirjailija onkin, sanankäytön ammattilainen. Mitä esperanton harrastamisella olisi tarjota Kreetta

Onkelin kaltaiselle kielenoppijalle, jonka itsetuntemus on murskattu kielten opiskelun suhteen?

Joillekin, en toki sano kaikille, esperanton rakenteen helppous on antanut uuden mahdollisuuden kielten oppimiseen itsetunto säilyttäen. Lisäksi esperanton opiskelun vapaaehtoisuus on aivan toista kuin koulussa, josta todistuksen saaminen helpottaa jatkopaikan saamisessa. Pakkopulla on aina pakkopullaa ja jos ei tunne suurempaa viehtymystä kielioppeihin (niitäkin on useita lajeja), saattaa itsekin tuntea nahoissaan sellaisen kielenoppijan tuskan joka on ihan ulalla kielten teoriapuolesta.

Pirkka-lehdessä nro 11/2001 kerrottiin lehden järjestämästä kilpailusta, jolla etsittiin lukijoiden kielenoppimisniksejä. ”KONSUKIEPREN” -sana auttaa muistamaan ruotsin sivulauseen sanajärjestyksen: konjunktio, subjekti, kieltosana ja predikaatti. ”SPOTPA” -sanalla helpotetaan muistamaan englannin sanajärjestys: subjekti, predikaatti, objekti, tapa, paikka ja aika. Olisiko esperantolle keksittävässä vastaavia muistin helpottajia? Jos sinulla on omia muistisääntöjä esimerkiksi ”hattujen” merkitsemiseen, prepositioiden valintaan tai ääntämykseltään samanlaisten sanojen erottamiseen, kirjoita ne ylös ja lähetä Esperantolehden toimitukselle.

Kiitän EAF:ää saamastani stipendistä ja toivotan lehden lukijoille sekä avustajille rauhallista, kiireetöntä jouluaikaa ja onnellista uutta vuotta.

Aimo Rantanen

Esperanto – lingvo por ĉiuj – lingvo por ni

Ambaŭ el la rubrikaj karakterizoj estas al ni konataj. La iniciatinto L.L.Zamenhof almenaŭ komence celis Esperanton kiel dua lingvo por ĉiuj – aŭ fakte pli ĝuste – por kiu ajn, sed ĝis nun ĝi restas pli malpli lingvo por ni, la rondo familia. Multaj esperantistoj kaj ne-esperantistoj jam pensadis la kialojn de tio, ke Esperanto ankoraŭ ne venkis. Oni krome diskutis eĉ pri tio, ĉu la venko de Esperanto entute estus pozitiva afero por la mondo.

Realisme pensante ekzistas almenaŭ tri faktoj, kiuj certe influis al la ne pli granda vastiĝo de Esperanto. Unue esperantistoj kaj eĉ Zamenhof mem estis tro optimismaj kaj rapidemaj. Longe oni atendis la finan venkon okazi dum kelkaj jaroj aŭ jardekoj, sed nun jam oni konfesas, ke tia ne povas okazi rapide. Due la ekstera mondo estis kaj restas tro skeptisma kaj eĉ timema rilate al planlingvo, kies avantaĝoj estas evidentaj. Kaj se la granda popolo en iu lando vidas Esperanton utila, tiam almenaŭ la registaro estas kontraŭ ĝi. Tria fakto, kiu ĉie influas, estas ke oni ne povas antaŭvidi la estontecon. Malgrandaj, eĉ senintencaj agoj ie en la

mondo povas kauzi subitan ŝanĝiĝon de la tuta monda situacio. En la monda historio tre malmultaj homoj farante ion sciis, ke ili komencis novan mondepokon per tiu ago. Kaj krome ekz. naturkatastrofoj estas tute neantaŭvideblaj. La mondo tuttempe ŝanĝiĝas kaj la movado devus tuttempe klopodi agi laŭ la plej utila maniero en ĉiu situacio.

Mi estas eble iom pesimisma, sed tamen ne volus esti tia. Mi kredas, ke unu el la plej trafaj pensoj de Zamenhof estas, ke “eĉ guto acida konstante frapante traboras la monton granitan”. Kvankam Esperanto estas mem-evidente klara kaj bona afero por ni, tamen konvinkigi tion al iuj aliaj estas ekstreme malfacile. Sed se ĉiam troveblas movadanoj, kiuj senlace agas por la lingvo, tiam ĝi konstante kvankam eble ne rapide antaŭeniras. Kaj povas iam okazi, ke iu hazarda ŝanĝo en la mondo montros al la tuta homaro, ke ĝuste Esperanto estas LA solvo. Ni do pri-zorgu pri tio, ke la gutoj ne ĉesu frapadi.

Mi deziras trankvilajn, ĝojoplenajn jar-ŝanĝajn festotagojn al ĉiuj legantoj kaj ĉion bonan dum la komenonta jaro 2002.

Jukka Laaksonen

Alvoko

La jarkunveno de Esperanto-Societo de Finnlando okazos dimanĉon, la 24-an de marto 2002 je la 10-a horo en Suomen Nuoriso-opisto en Mikkeli.

La Estraro

Kokouskutsu

Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto r.y.:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään sunnuntaina 24. maaliskuuta 2002 Suomen Nuoriso-opistolla Mikkeliissä. Kokouksessa käsitellään liiton säännöissä mainitut vuosikokousasiat.

Hallitus

Aŭtunaj Tagoj en Helsinko

– nenia *dirlididi*

Naŭdek esperantistoj el ok landoj vigle partoprenis la Aŭtunajn Tagojn fine de septembro. Ni aŭdis plurajn prelegojn, koncertojn; ludemuloj ludis kaj dancemuloj lernis danci. Krome la Kulturcentro Caisa bone manĝigis nin kaj sur ĝiaj muroj ni vidis du ekspoziciojn, nome fotojn de *Riitta Eckerman* pri la vivo en Kubo kaj fotojn de *Aleksander Safantjevski* pri lumo kaj aero, precipe en Peterburgo kaj naturo. Tiel la etoso estis pli internacia ol kutime dum AT. Ankaŭ Esperanto estis pli uzata kaj aŭdata ol ekz. en 2000. Mi vere bedaŭras, se vi ne povis aliĝi. Tial mi mallonge resumas la prelegojn, kiujn mi aŭskultis kun granda intereso.

Profesoro *Jouko Lindstedt* enkondukis nin al la uzo de Esperanto kiel hejma lingvo. Kvankam kelkaj geedzoj kaj paroj, kiuj konatiĝis pere de Esperanto, poste prenas al si la lingvon de la loĝlando, Esperanto ĉiam restas proksime al ilia koro. La denaskaj parolantoj de Esperanto nombras ĉ. 1000. Pli ol duono el ili devenas de samlingvaj parolantoj. Tamen la situacio en ĉiu familio estas aparta, kaj daŭra kontakto kun aliaj parolantoj estas bezonata. Ĝuste tial ekzistas *Rondo Familia*, enreta diskutlisto (100 abonantoj) kaj infanaj kongresetoj. Kialoj por la hejma uzo de E-to:

- la gepatroj ŝatas vojaĝi al E-aranĝoj kaj la lingvo ebligas la partoprenon ankaŭ al la infanoj
- la gepatroj opinias ke E-to edukas al internaciismo
- la gepatroj opinias ke dulingveco estas pozitiva afero kaj efikas favore al intelekta evoluo
- la gepatroj konatiĝis pere de E-to.

Kiam la denaskuloj kreskas, ili ne ĉiam ŝatas esti nomataj esperantistoj kaj ili malŝatas esti uzataj kiel ekzemploj. Multaj denaskuloj neniam aperas en E-rondoj kaj neniu aŭtomate fariĝas aktivulo. En la aĝo de 15 jaroj la gejunuloj eble

rifuzas partopreni kongreson. Ni ne romantikumu pri denaskuloj! Por neniu plenkreska homo E-to estas la plej forta lingvo, ĉar pro la lernejo kaj laboro ĉiuj bezonas alia(j)n lingvo(j)n. Ni ne imagu ke troviĝas unulingvaj denaskaj parolantoj de E-to!

En sia prelego *Lingva diverseco* Lindstedt provis komprenigi al ni, kiom malfacilas distingi inter lingvo kaj dialekto. En Ĉinio ne ĉiuj dialektoj estas interkompreneblaj parole, kvankam la ideogramoj samas, dum estonoj kaj finnoj iome komprenas la parolon unuj de la aliaj, sed la finnan kaj estonan oni ne konsideras dialektoj sed apartaj lingvoj. Tial ne facilas respondi la demandon, kiom da lingvoj ekzistas en la mondo; parolataj homaj lingvoj povas nombri 6000 aŭ 10000. (Lindstedt rimarkigis, ke jam mortis eĉ pli da lingvoj). Krome estas uzataj ne-parolataj lingvoj, ekz. gestolingvoj.



Jouko Lindstedt.

95% da lingvoj havas malpli ol milionon da parolantoj. La plej multajn lingvojn oni tute ne skribas, kaj aldone al la literaro, kiun oni uzas en la plej multaj okcidentaj landoj, troveblas centoj da aliaj skribsistemoj. La plej grandaj lingvoj en la mondo estas la mandarena ĉina, hispana, angla, araba, bengala, hinda, portugala, rusa. La vera lingva diverseco estas neimagebla al ni finnoj, el kiuj kelkaj plendas jam pro nia dulingveco. En Papuo-Novgineo estas parolataj 850 lingvoj, en Indonezio 770, en Niĝerio 400, en Bharato 380, en Brazilo 210 ktp. Ŝajnas ke lingva diverseco koincidas kun biologia diverseco. Konsiderante ĉion tion, oni povas konkludi nur ke lingve Eŭropo estas relative homogena kontinento.

Pri la t.n. morto de lingvo Lindstedt klarigis, ke plej ofte la parolantaro alilingviĝas pro sociaj kaj politikaj kaŭzoj. Se la parolantoj mem komencas malaprezi sian lingvon, ili ne emas konservi ĝin; ili trovas ĝin ne utila kaj intence ekuzas alian. Estas antaŭvidite ke 90 elcentoj de la parolataj lingvoj mortos dum la nuna jarcento. Ĉiusemajne malaperas unu lingvo. Tamen plurlingveco estas riĉaĵo por la individuo kaj lingvoj estas rezervoj por la kulturoj kiuj ilin uzas. Se malaperas la lingvo, facile malaperos ankaŭ la kulturo.

– Al la demando *Kiaj estas esperantistoj sociopsikologie* provis doni respondojn franca sociopsikologo *Fabienne Berthelot*. Ŝi konstatis, ke pri la temo neniu serioza studo ekzistas, sed ŝi tamen kuraĝis distri kaj ankaŭ iriti nin per supozoj kaj observoj. Neniu povus vere pruvi, ĉu la plejparto el esperantistoj estas viroj, aĝas malpli ol 30 aŭ pli ol 60 jarojn, havas altan studnivelon sed malaltan rangon en la socio. Plie estis supozite, ke esperantistoj havas komunikproblemojn, sed en la nova generacio troveblas multaj ludemuloj kaj homoj kun imagkapablo. Instruistoj, matematikistoj, informatikistoj kaj oficistoj multas inter ni. Estis amuze kaj pensoveke aŭskulti la prelegantinon kaj kompari sin mem kun la ĝeneraligita "esperantisto". Ĉu vi

kaj mi kongruas kun la bildo? Berthelot aludis, ke se oni mem estas esperantisto, oni ne povas neŭtrale pristudi esperantistojn

Pri *Interkultura komunikado kaj internaciaj komunikproblemoj* Berthelot havas proprajn spertojn, ĉar ŝi ofte alfrontas francajn, nederlandajn kaj hungarajn kutimojn kaj devas adaptiĝi al ili. Ŝi pritraktis ankaŭ la okcidentan kaj orientan konceptojn pri tempo kaj la nordan kaj sudan sintenojn al spaco en interhomaj situacioj. Ŝi montris, ke tempo estas kultura aspekto kaj la dividiĝo *-is/-as/-os* ne ĉie estas memevidenta aŭ eĉ ebla. Al araboj gravas miloj de jaroj antaŭe, dum usonanoj vivas en la estonteco. Okcidentanoj komprenas tempon kiel rektan linion ekde iu "komenco" dekstren al futuro, dum por kelkaj aliaj ne ekzistas "komenco" kaj "fino" sed cirklo aŭ "nun". Kiel amuzajn detalojn ŝi menciis la daŭron de "pardonebla malfruo" en diversaj landoj/kulturoj kaj la diverslandajn manierojn viciĝi antaŭ giĉetoj kaj la kutimon (ne)rigardi homojn en la strato. Ni eksciis ankaŭ ke ni ne frapetu la kroatian prezidenton



István Ertl.



Fabienne Berthelot.


sur la ŝultron aŭ ŝanĝu lian horaron per atendigo. Ni ne enkonduku niajn proprajn kutimojn en alian landon sen sciigi pri la tiea etiketo.

István Ertl prelegis pri *Kiom viva estas Esperanto*. Li diris, ke en kelkaj fakoj kaj medioj Esperanto bonfartas (kulturaj centroj, kongresoj, prelegoj, literaturo, gazetaro, ŝako, korbo- kaj piedpilkado), sed en kelkaj aliaj fakoj sentblas manko de terminoj kaj vortoj (ne okazas procezoj aŭ verdiktoj en E-to). En kelkaj landoj (Togo, Brazilo) Esperanto estas pli uzata ol en aliaj. En Eŭropo, proporcie al la landa loĝantaro, en Esperanto pintas Islando, Luksemburgio kaj Kroatio. Avantaĝoj de E-to kaj kialoj por ĝia viveco estas, ke ĉiu povas kunkrei la lingvon ĉiutage sen pensi pri jamaj modeloj.

Bedaŭrinde Ertl ne havis sufiĉe da tempo por uzi tutan sian materialon pri ekkrioj, onomatopoeoj kaj sakroj. Tamen ni nun scias ekzemple, ke ni esprimu nian heziton per la interjekcio *be*, nian indiferentecon kaj malaprezadon per *bas* aŭ, pli moderne, per *dirlididi*. En la telefono ni diras *ha lo*, kaj ne *halo*, la skriba diferenco bezonatas, ĉar *halo* havas ja alian sencon. Ni

ek-irigas la ĉevalon per *hot hot* kaj haltigas ĝin esperante per *tpr*. Ho ve, niaj ekkrioj ofte estas tiom elanaj kaj impetaj, ke ni facile uzas nur la nacilingvaj kun la adekvataj mienoj kaj gestoj. Kelkajn ĉeestantojn Ertl petis iom aktori kaj montri la sialandajn, kio igis la aferon amuza kaj klara.

Patrik Austin, studento pri nordiaj lingvoj kaj prezidanto de FEJO, prelegis pri *Nordiaj lingvo-minoritatoj*. Sen pritrakti la ĵusajn enmigrintojn li montris, ke en Nordio ekzistas pli da lingvoj ol oni kutime pensas. Lia listo enhavis sep sameajn lingvojn, la feroan (kiu estas inter la dana kaj islanda kaj parolatas en Fär-insuloj), inuktitut (lingvo de inuitoj, antaŭe nomitaj “eski-moj”), finlandsvedan (oficiala versio de la sveda, ne dialekto!), meänkieli (parolata en la valo de Torneo/Tornio-rivero), kvenfinnan, germanan (minoritata en Danlando), romnan (variantoj de ciganaj lingvoj), jidan (norda versio de la hebrea). La publiko proponis, ke li aldonu la tataran kaj la rusan. Li menciis ankaŭ la signolingvojn kaj atentigis ke Norvegio havas du lingvojn, bokmal (pli proksima al la dana) kaj



Patrik Austin.

nynorsk (bazita sur lokaj dialektoj). Tiel ni iĝis konsciaj pri la lingva diverseco de Nordio. Ĝuste tio ke la aŭskultantaro intervenis per demandoj kaj rimarkigoj pruvis ke la prelego interesis kaj ekscitis ĝin. Kiel *Dro Espo P. Austin* iom malkaŝis la esperantan slangon, vd. <<http://www.nettie.fi/droEspo>>, kie vi vidus la plej novajn E-esprimojn kun iliaj anglaj ekvivalentoj, sed ne rigardu, se vi estas pruda!

Dum la *Arta vespero* sabate ni estis regalataj per muziko, poemoj kaj kantoj fare de la belartkonkursa famulino *Anja Karkiainen*, Istvan Ertl kaj *Mikko Saarnio*. La vesperon finis tre bela *Lulkanto*. Mi esperas, ke Esperantolehti iam rajtos kaj povos aperigi parton de tio, kion ni aŭdis, por ke ni havu tempon repensi pri la enhavo de la aŭditaĵoj (kaj pri la neaŭditaj vortoj).

La dimanĉmatena diservo okazis en la kapelo de Suurkirkko-katedralo. La kapelon uzas surduloj kaj aŭde handikapitaj. La etoso estis intima kaj kvietiga. *Raimo Tanskanen* ludis la orgenon kaj ankaŭ akompanis la solkantadon de *Anja Karkiainen*. *Matti Pesonen* predikis kaj faris la liturgian servon, helpe de geesperantistoj *Kantele*, *Kesänen* kaj *Heikkinen*, kiuj laŭtlegis



Katja Lampinen, dum la kvizo.

bibliajn tekstojn. Unu el la tekstoj pensigis min ankaŭ socie kaj politike: ”..kiu akceptos ... infanon en mia nomo, tiu akceptas min... Gardu vin, ke vi ne malestimu unu el tiuj malgranduloj, ĉar ... iliaj anĝeloj en la ĉielo ĉiam rigardas la vizaĝon de mia Patro.” Kiom multe plenkreskuloj pekas antaŭ la infanoj de la mondo!

FEJO (Finnlanda Esperantista Junulara Organizo), Helsinka E-klubo kaj EAF meritas mian plej koran dankon pro la pli ol dutaga bonega aranĝo.

Saliko

Katja Lampinen, studento pri komunikado kaj sekretario de FEJO, pritraktis en sia prelego pri nelingvaj esprimoj la komunikadon, kiu okazas pere de gestoj, mienoj, pozoj, voĉtonoj, uzo de spaco, vestaĵoj kaj objektoj. Ŝi rakontis, ke ĝi estas en ĉiuj kulturoj pli grava ol la lingva komunikado, sed la grado varias. Laŭ usonaj studoj nur 3 % el la tuta komunikado estas lingva, dum ĉe ni oni taksas ĝin unu triono.

Pri la prezentataj faktoj ŝi donis bonajn praktikajn ekzemplojn kun helpo de volontuloj, kaj pensigis la publikon pri siaj propraj spertoj per gruplaboro.

Estis konstatite, ke la bazaj mienoj pri feliĉo, surprizo, zorgo/timo, malĝojo, kolero, enuo kaj interesiĝo estas la samaj ĉie en la mondo. Oni tamen povas uzi ilin malsimile, ekzemple en kelkaj kulturoj oni ridetas daŭre, dum en aliaj rideto ne konvenas en ĉiuj situacioj. La mienoj estas sufiĉe facile kompreneblaj, sed gestoj kaj pozoj pli komplikaj. Krome oni ne devas konkludi ion de nur unu gesto aŭ mieno, sed interpreti la nelingvan esprimadon kiel tutajon.

Katja atentigis nin pri imitado de gestoj kaj pozoj, kiu ofte okazas senkonscie, kiam la babilantoj samopinias.

Afero, kiu tre varias en diversaj kulturoj, estas la persona spaco de la homoj, t.e. kioman distancon al la aliaj ili sentas agrabla parolante ”publike” al granda grupo samtempe, ”sociume” al nekonatuloj, en ”personaj” kontaktoj ekzemple laborejoj aŭ festoj kaj ”intime” en zono, kiun



Riitta Hämäläinen.

rajtas eniri nur la plej proksimaj personoj. Oni-dire la klimato influas al tio, en varmaj regionoj tiuj spacoj estas pli malgrandaj kaj la homoj pli tuŝas unu la alian ol en malvarmaj. Ofte kaŭzas miskomprenojn tio, ke en multaj aziaj, arabaj kaj latinidaj kulturoj la homoj estas pli sociumaj kaj grupemaj kaj "legas" plej grandan parton de la komunikado el nelingvaj esprimoj, dum en la individuemaj kulturoj, ekzemple la usona, germana kaj skandinavia, plej gravas la lingva komunikado kaj ekzaktaj signifoj de la vortoj. Tamen oni memoru, ke ene de la kulturoj estas grandaj diferencoj inter la homoj pro karakteraj ecoj, sekso, profesia grupo ktp.

Ĉar estas facile misinterpreti, Katja avertis pri troa interpretado. Ŝi tamen instigis nin pli uzi nian nekredible esprimovan korpon, sed sen forgesi diri belajn vortojn unu al la alia.

Posttagmeze eblis kleriĝi pri la kultura historio de Esperantio, unue per la videofilmo "Kino-arto kaj ni", kiu montris tiun terenon ankoraŭ sufiĉe nekultivita. Kvankam Esperanto aperis jam en kelkaj filmoj en la 30-aj jaroj kaj la unua originala, "Angoroj" estis farita en 1964, la mallonga bendo enhavis fragmenton de preskaŭ ĉiuj verkoj. La plej lastaj, jam iom profesiaj, nomiĝas "En Eŭropo ie", "Mefisto" kaj "Babel".

Riitta Hämäläinen prelegis kun sonekzemploj pri la historio de esperanta popularmuziko, konstatinte, ke pri la unuaj 70 jaroj estas malmulto

dokumentita. En la 60-aj jaroj komenciĝis en Esperantio kiel ankaŭ en la mondo ĝenerale "aŭtorkanta fenomeno", kiu daŭris ĝis komence de la 80-aj jaroj. La kantoj estis tiutempe amatorece prezentataj, ĉefe tradukitaj pecoj. La originalaĵoj estis primovadaĵoj. En 1985 publikiĝis la unua esperanta rokkasedo, "Tute ne gravas" de *Amplifiki*. Fine de la 80-aj jaroj aperis multaj novaj bandoj kaj kantistoj, plia vario, plia profesieco, novaj temoj ne-primovadaj. Tiam naskiĝis ankaŭ esperanta roko kaj la koncepto pri "origine esperanta" kaj "papaga". La unua kompaktdisko estis de *Kajto* en 1989. La sama jaro estis sufiĉe signifa por la evoluo de e-muziko: nova *Persone* naskiĝis, aperis nova kasedo de *Amplifiki*, *Ĵomart kaj Nataŝa* aperis en okcidenta mondo, TEAM turneis en Eŭropo, naskiĝis *Eurokka/RokGazet* kaj la eldonejo *Vinilkosmo*, aperis pliaj artistoj kiel *Georgo Handzlik*.

La 90-ajn jarojn jam karakterizis ege plia profesieco (dank' al la enorma laboro de *Flo Martorell*), aperis multaj novaj diskoj, la esperanta muzikmondo iĝis bone kunordigita, venis pluraj bandoj ekstereŭropaj (*Porkoj, Merlin, Mevo*) kaj naskiĝis steluloj, unu el la plej grandaj en Finnlando! (*Dolcxamar, Persone, Jomo, Espo Despo*). Eldoniĝis tre diversstila muziko kun pli ambiciaj tekstoj ol antaŭe, de modernaj komputilaj sonoj kaj punkmuziko ĝis latinpopo kaj infankantoj. Ankaŭ pluraj ne-esperantaj bandoj faris esperante unu pecon (*EV, Massilia Sound System*). Nuntempe la esperanta muziko sufiĉe bone fartas kaj estas bona ilo por diskonigi, ke Esperanto ekzistas kaj vivas.

Hungara gasto, *István Ertl* instigis nian legemon prezentante du aŭtobiografiajn librojn de esperantistoj pri okazintaĵoj en Budapeŝto dum la nazia okupado en 44-45. "Maskerado ĉirkaŭ la morto" de *Tivadar Soros* (angla traduko prezentita en *Esperantolehti 2/2001*) priskribas la travivon de juda familio, kaj "Kaoso en Budapeŝto" de *Nina Langlet* protektadon de judoj en kunlaboro kun la Sveda Ruĝa Kruco.

Anja Karkiainen



Maldekstre: Dolcxamar ludis ankaŭ akustike en la Aŭtunaj Tagoj.

Sube: Teamoj de Kyykkä-ludo en la AT. Dekstre la venkinta kaj maldekstre la malvenkinta teamo. La ludon gvidis Hanna Helén.



Aŭtunaj Tagoj 2002 en Taivalkoski

La estraro de EAF decidis proponi al esperantistoj de Taivalkoski, ke la sekvaj Aŭtunaj Tagoj estu aranĝotaj tie, kaj la propono estis akceptita.

La datoj kaj temo ankoraŭ ne estis deciditaj. Esperantolehti informos poste pli detale.

Jukka Laaksonen

Brasilialainen ”Kurso de Esperanto”

– Esperantoa kevyesti kahvitauolla –

”Tietokone”-nimisessä web-lehdessä Atte Paananen arvosteli hiljattain brasilialaisen nettikurssin ”Kurso de Esperanto”. Paananen ylistää kurssia yleisvaikutelmaltaan todella hyväksi ja kehuu sen teknisiä toimintoja. Ilmaiskurssia, jota kurssin kotisivuilla ”sensaatiomaiseksi multimediaohjelmaksi” mainostetaan, on lehden tietojen mukaan Suomessa imuroitu jo 154 kertaan! Liekö esperanton opinnot pian it-poikien muoti-ilmiö!?

Kurssin kotisivun ulkoinen olemus on selkeä ja ilmava. Värien tasapaino miellyttää silmää. Markkinointipositiointi (=kenelle suunnattu) on selkeästi mietitty. Vihreät tähdet on jätetty ulkolle ja etusivu vastaa nyky maailman mainoskeinoja. Kurssilla kalastellaan nuoren nettisukupolven mielenkiintoa. Etusivulla kaksi rockhenkisen oloista nuorta naista istuskelee opettelemassa esperantoa kannettavalta tietokoneeltaan. Valikko lupaa chattailua, tutorointia ja biisitekstejä. Ensivaikutelma on hyvä. Houkuttelee jatkamaan.

Kurssi on jaettu 11 oppituntiin sekä loppukokeeseen. Kukin oppitunti koostuu 13 osiosta. Kyseessä ei ole sääntökokoelma muutamalla esimerkkilauseella höystettynä, vaan huomattavasti kunnianhimoisemmin laadittu nettikurssi. Kustakin osiosta löytyy perinteisempi kielioppiosuus ja sanasto-osuus, mutta myös harjoituksia. Oppilas tekee käännoharjoituksia ja testaa pelillä sanamuistiaan. Tietokone jakaa kehuja hyvästä onnistumisesta. Akkusatiivia testaava harjoitus, jossa oppilas siirtelee hiirellä N:ää oikeisiin kohtiin lauseessa on hieno.

Osioihin sisältyy kuullun ymmärtämisen harjoituksia. Oikea ääntäminen selviää hiirtä klikkaamalla, mikäli koneessa on kaiuttimet. Erityisen kehuttavaa on se, että kurssi käyttää myös esperantomusiikkia oheismateriaalina: Kurssi sisältää Personen, Merlinin ja Jomartin ja Nata-

šan musiikkia. Mieluusti artistivalikoimaa olisi voinut kasvattaa myös musiikillisesti modernimpaan suuntaan: Solotronik, Merlinin uudempi tuotanto ja Dolcxamar sopisivat ”multimedia-sensaatioon” mainiosti.

Jos yleisolemus, grafiikka, äänimaailma ja itseopiskeluun mainiosti soveltuvat harjoitukset ovat kurssin vahvuuksia, sen heikkous löytyy valitettavasti kurssin pedagogisesta suunnittelusta. Kieliopin opetus perustuu esperanton 16 sääntöön, mutta esim. kysymyssanojen, prepositioiden tai suffiksien opetusta olisi voinut pilkkoa sopiviksi ja motivoiviksi annospaloiksi. Kun oppitunnin nro 1 ainoa kielioppiasia on substantiivin ja adjektiivin ero, suffiksit ja kysymyssanat lyödään eteen yhdellä oppitunnilla pitkänä, uuvuttavana ja epämotivoivana listana. Esperanton sanamuodostus, jonka oppilaat usein kokevat kielen viehättävimpänä piirteenä, jää melko vähälle huomiolle. Itseopiskelijaa ei houkutella sanoivalluksiin.

Kurssin toinen miinus on sen sisällöllinen tylsyys. Esimerkkilauseet eivät ole lainkaan tasapainossa etusivun lupaavan modernin imagon kanssa. Kurssin tekijältä puuttuu näkemys siitä, millaisissa tilanteissa hän ajattelee oppilaidensa käyttävän esperantoa. Kielikurssilla oleellista on välittää oppilaalle tunne siitä, että kieli ei ole vain kokoelma absurdeja lauseita oppikirjan sivuilla, joita opetellaan ainoastaan kielioppisäännön takia. Todella tärkeä osa kielen opiskelua on antaa oppilaalle tunne käyttökelpoisesta kielestä ja opettaa sanastoa, jonka oppilas voi liittää omaan reaalielämäänsä ja todelliseen käyttötilanteeseen.

”Kurso de Esperanton” esimerkkilauseissa ja sanastossa on valitettavasti unohdettu täysin todelliset käyttötilanteet ja nyky maailma. Etusivun nuoret naiset tuskin tarvitsevat kovin usein lauseita ”*Li kaptis la trian insekton*” (Hän nap-

pasi kolmannen hyönteisen), ”*Ĉu la lakto estas varma*” (Onkos maito lämmintä?) tai ”*Mia patrino lavas mian fraton*” (Äitini pesee veljeäni)! Akkusatiivia hinkataan lauseella ”*Mi lavas novan tason*” (Pesen uutta kuppia), kun kohderyhmän todelliset akkusatiivilauseet olisivat pikeminkin ”*Mi aĉetis hieraŭ novan ĵinzon kaj lipruĝon*” (Ostin eilen uudet farkut ja huulipunat), ”*Mi aŭkultas novan diskon de Britney Spears.*” (Kuuntelen Britney Spearsin uutta levyä), ”*Ĉu vi jam spektis la novan islandan filmon Reykjavik 101?*” (Oletko jo nähnyt sen uuden islantilaisen leffan Reykjavik 101?.) tai ”*Mi havas novan umikon/umikinon.*” (Minulla on uusi poikaystävä/tyttöystävä). Kurssilla ei esiinny kertakäyttölauseita ”*Puhutko esperantoa*”, ”*Mistäs olet kotoisin*”, ”*Mikä sun nimi on*”, ”*Lähetkö tanssimaan*”, ”*Yksi olut, kiitos*”, jotka lienevät ne käyttökelpoisimmat, kun ollaan ensi kertaa esperantofestareilla. Sama ongelma, yliteoreettisuus todellisten käyttötilanteiden kustannuksella, vaivaa esperanto-oppimateriaalin suunnittelijoita valitettavan usein.

Kritiikkiä antaisin myös kurssin info-osuudelle esperantosta. Sorrutaan taas liioittelemaan puhujien määrää, luvataan ylitiöidealistically ratkai-

sua maailman kaikkiin kieliongelmiin ja vertailaan esperantoa englanttiin.

Kurssin ajoittaisesta tylsyydestä huolimatta suosittelen sitä kaikille itseopiskelusta kiinnostuneille. Esperanton perusteet käyvät varmasti selviksi ja kuuntelu- ja harjoitusosuudet ovat hyviä. Kurssi sopii mainiosti kiireisille tietokoneen ääressä istujille, jotka haluavat oppia kieltä vaikkapa kesken työpäivän, kahvitauolla, omaan tahtiinsa. Puhetilanteet täytyy tosin opetella festareilla nollasta, mikäli haluaa jutustella jostain raflaavammasta aiheesta kuin leivän kuivuuasteesta ja maidon lämpötilasta.

Riitta Hämäläinen

Kurssin kotisivu:

<http://www.cursodeesperanto.com.br>

Arvioitu imurointi-aika: 56 kbs / 31 min. 21 s.

Tiedostojen yhteiskoko: 9405 kt

Opetuskielivalikoima: englantti, espanja, hollanti, italia, korea, kreikka, liettua, norja, puola, ranska, ruotsi, saksa, tanska, tsekki, venäjä

Tekijä: Micnet Internet Provider

Nuortenkirja aikuisille

Populäärimusiikkia Vittulajänkältä.

Suomennos: Outi Menna.

Alkuperäinen romaani:

Populärmusik från Vittula.

Like, Helsinki. Jyväskylä 2001.

Mikael Niemen romaani on kehitystarina kahdesta pajalalaispojasta Matista ja Niilasta, jotka elävät nuoruuttaan 60-70-lukujen vaihteessa, harrastavat sähkökitaramusiikkia, kiljunvalmistusta ja tyttöjä. Pajala on heidän kertojankyyvilleen hedelmällistä seutua. Lestadiolaisuus, sukuvihat ja laajojen sukujen kaikkien sivuhaarojenkin ihmisten muistissa pitäminen on arki-

päivää. Valtakunnanrajat eivät pidättelee heitä, sukulaisia on Etelä-Ruotsista Yhdysvaltoihin. Sukujuhlat: häät ja hautajaiset kokoavat kaikkialta ilmansuunnilta yllättäviäkin sukulaisia Pajalaan. Lomassa Matin ja Niilan kehityskertomuksen kanssa kulkee pajalalaisukujen ylimuistoinen saatto.

Kirjassa on 15 lausetta esperantoksi. Niila nimittäin lattialla leikkiessään sattui kuulemaan vuoden 1969 Helsingin Esperantokongressin kunniaksi esitetyn radiokurssin kaikki osat. Tiedostamattaan hän oppi kielen perussanaston ja kieliopin niin hyvin, että siitä tuli Matin ja Niilan yhteinen salakieli. Tämä tarina kertoo pajalalais-ten *ready made* -asenteesta. Kaikki havaittu kelpaa materiaaliksi tarinoihin. Tarinankertojalla ei

Euroscola-en-Esperanto: Jam certiĝis partopreno en 2002

La semajnfinan kurson 2-4 novembro partoprenis tri viglaj knabinoj el Raŭmo. Ili lernis la bazan gramatikon laŭ la videokurso Mazi en Gondolando kaj ĉiutagajn vortojn dum la manĝopaŭzoj, ludoj kaj kantoj. Dum du lecionoj ili lernis pri EU kaj lingvopolitiko. Instruis Carola Antskog, Anna Ritamäki kaj Tuomo Grundström.

Ĉar ĉiuj partoprenantoj loĝas en Raŭmo estas konvene ke la dua parto de la kurso okazas tie. Dum 12 lecionoj la scioj de la semajnfino stabiligis sub gvido de Tuomo.



En marto (14-16.3) okazos la tria parto de la kurso, denove en Kimito/Kemiö. Al tiu daŭriga kurso estas bonvenaj ankaŭ novaj partoprenantoj, gejunuloj en la aĝo 15-18, kiuj jam bone regas la enhavon de MAZI (partoj 1-6) kaj deziras partopreni la Euroscola-eventon. Tiam ni lernos pli pri EU kaj la temo de la ĉi-jara Euroscola kaj la scioj de Esperanto firmiĝas laŭ MAZI (partoj 7-12). Por novuloj gravas frua anonciĝo al Carola Antskog (vidu la liston de asocioj, ELFI) por ke ni povu prepariĝi por la vojaĝo al Strasburgo.

Nia grupeto jam anonciĝis al la organizantoj de Euroscola-en-Esperanto. La 24an de novembro ni ricevis la informon ke la tagoj en kiuj Esperanto estos parolata en la Eŭropunia parlamento kadre de Euroscola estas la 19a de marto kaj la 17a de aprilo. Ni ankoraŭ ne scias en kiu el la kunvenoj partoprenos la grupeto de Finnlando.

Carola Antskog

Riikka, Suvi kaj Paula planas vojaĝi al Strasburgo kadre de la Euroscola-projekto. Ĉu ankaŭ vi (aŭ via 15-18-jara konatulo)?

ole mitään ennakkoluuloa korjatessaan tarinoihinsa aineistoa. Kun jokin on päässyt pajalalais-ten tarinoihin, siitä tulee sukujen kokoontumisen kautta yhteistä omaisuutta, joka siirtyy suullisena perinteenä eteenpäin.

Vittulajänkältä -sana kirjan nimessä ei ole al-
lekirjoittaneen mielestä oikein muodostettu. Voidaan sanoa *jänkhän*, mutta ei *jänkhältä*. Aivan kuin pohjalaisten jänkähän ja tekemähän, samoin on meän kielessä jänkhän ja tekemhän.

Vittula -paikannimessä pitäisi olla genetiivin tunnus. Siis: Vittulanjängältä, kuten Radio Ylen Ykkösen juontaja Pertti Eerola asian aivan oikein oivalsi. Hesän meänkieli romaanin nimes-
sä on siinä mielessä puolusteltavaa, että ajassamme regionaalisuus ja kosmopoliittisuus menevät päällekkäin. Pajalalaiseen voi törmätä Stockmannin jonossa aivan yhtä hyvin kuin Tukholmassa.

AR

Pensoj pri instruiloj

Kvar membroj de ELFI (Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj) kunvenis en Kimito/Kemiö 10-11 novembro.

Sekve de niaj spertoj pri lernolibroj por komencantoj, ni decidis rekomendi ke EAF reeldonu la kursolibron “Egaleco kaj paco per Esperanto” de Lars Forsman (trad. Raita Pyhälä). Ĝi taŭgas ankaŭ por memlernantoj. Ankaŭ gravus distribui la stokon de la ne tre konata “Jutellaan” de Andrzej Pettyn. Tiun paroligan lernolibron por komencantoj eldonis Mendoservo en 1995.

Ni volas atentigi ankaŭ pri la kursolibro “Ludoviko Zamenhof” de Lars Forsman. Pere de ĝi daŭrigantoj lernas la plej gravajn faktojn pri la frua evoluo de nia lingvo. La libro enhavas ekzercojn lige al la tekstoj. Eblas utiligi ĝin ankaŭ memstude.

Bona lernilo por daŭrigantoj estas ankaŭ “Juna amiko”, la lernejana revuo kiun eldonas ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). Interalie Raita Pyhälä kaj Anja Karkiainen regule kontribuas al ĝi. Oni povas ĝin aboni kontraŭ 11 eŭroj pere de Sylvia Hämäläinen. (Pagu al ŝia konto 800028-10300680 kaj memoru skribi vian nomon kaj adreson!)

Ni rigardis la vidbendan kurson “Pasporto al la tuta mondo”, en kiu amatoraj aktoroj prezentas rakonton kie diversaj ridindaj karakteroj kaj situacioj antaŭenigas la lernadon. Ĝi ŝajnas taŭga por homoj kiuj jam iomete konas la lingvon, ekzemple por ripetado. Al ĝi apartenas sufiĉe abunda ekzercaro. Pli taŭga por veraj komencantoj estas la vidbenda kurso pri Mazi kaj la aliaj desegnitaj figuroj en Gondolando. Ĝi havas ege klaran strukturon, sed la ekzercaj taskoj estas

malmultaj. Tial ni planas kompili ekzercaron por la Mazi-kurso. Pri tiu ni kunlaboros kun IEI (Internacia Esperanto-Instituto). Mirinde estus se Mazi en Esperanto aperus en YLE-televido.

Lige al la kurso en Valamo 1-5 junio 2002 ELFI planas aranĝi seminarion por instruistoj. Ankoraŭ ni ne decidis ĉu ĝi okazu antaŭ aŭ post la kurso.

*Carola Antskog
ELFI*

***Carola Antskog,
Sylvia Hämäläinen,
Raita Pyhälä kaj
instruiloj.***



Fabelfesto 2001

En la 18-a de oktobro okazis la fabelfesto en Taivalkoski en la sporthalo Taivalkaari. Oni premiis la gajnintojn de kaj finnlingva kaj esperantlingva fabelkonkursoj. Aini Vääräniemi kun siaj lernantinoj Elina, Kirsi kaj Niina Tauriainen iris sur la scenejon vestitaj per rolkapvestoj. Jen la parolado farita de Aini:

”Bonan tagon! Mi estas koko. Elina: ”Mi estas ŝafo”. Kirsi: ”Mi estas urso”. Niina: ”Mi estas muso”.

– Esperantlingva fabelkonkurso estis aranĝita nun la duan fojon. Venis 20 fabeloj el naŭ landoj: Belgio, Italio, Francio, Jugoslavio-Serbio, Rumanio, Ĉeĥio, Hungario, Kroatio kaj Finnlando. La konkurso okazis sub la auspicioj de UEA, kiu ankaŭ donacis la libro- kaj diskopremiojn por la gajnintoj. En la ĵurio ĵurians Raita Pyhälä kaj Jouko Lindstedt el Finnlando, kaj Anna Löwenstein el Italio.

Estis tri kategorioj en la konkurso. Jen la rezultoj:

Kategorio A:

1. *La sorĉistino kaj la araneoj*: Grupo Pinokjo, la elementa lernejo ”La Castellina” en Prato, Italio

2. *Promenado en ĉina ĝardeno*: Grupo Du en infanlernejo ”4 Vents – Martin Luther King” en Chateauroux, Francio

3. *La granda nigra nubo*: Grupo Marko el ”La Castellina”, Italio

Kategorio B:

1. *La perdita harmonio*: Grupo La Herberoj el ”La Castellina”, Italio

2. *Iam estis monstro*: Karina MacGill, Hungario

3. *Pikec kaj Paulina*: Stefani Strunjak, Kroatio

Kategorio C:

1. *Riĉa reĝo*: Zlatko Dordevic, Jugoslavio-Serbio

2. *Princino de formikoj*: Zlatko Dordevic

3. *Vojaĝoj kun marfeinoj*: Zlatko Dordevic

La premion ”Fabelo Internacia” gajnis la grupo Pinokjo. La premioj estos sendotaj perpoŝte. Ĉiuj partoprenantoj ricevos diplomon.

El Taivalkoski partoprenis la konkurson Elina, Kirsi kaj Niina Tauriainen. Elina verkis la fabelon ”Rakonto de ĉambro de infanoj”, Kirsi verkis la fabelon ”Festo en arbaro”, Niina verkis la fabelon ”Familio koboldo”. Nun mi petas ke institutestro Matti Kaarlejärvi kaj La Fabelonklo Niilo Keränen donu diplomojn kaj vortarojn La Angla-La Finna donaĉitaj de Päätalo-Instituto por la filinoj de Tauriainen. (Okazis.)

Fine mi petas ke Kirsi laŭtleĝu la parton de sia fabelo kaj esperante kaj finne.

Kirsi: “...Urso komencis la feston per parolado. Li ricevis multajn aplaŭdojn. Komencis bela muziko. Ĉiuj bestoj manĝis, trinkis kaj dancis. Nun okazis la plej grava programero de festo: oni malkovrigis la statuon, kiun oni konstruis dum tri jaroj. Birdetoj forprenis litotukon kiu estis sur la statuo. Ĉiuj surpriziĝis kaj estis gajaj, ĉar la statuo estis tre bela verda stelo. Ĝi memorigis al bestoj, ke ĉiuj estas egalaj.”

– Dankon kaj ĝis venontaŭtuno! ĜIS!”

En 29-a de oktobro estis starigita la statuo LA ESPERO ĉe la enirejo de Arbaro de Zamenhof en Metsäkylä.

Aini Vääräniemi

www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/international.htm

”Lingvo de mia sorto”

”Mi sentas, ke esperanto estas lingvo de mia sorto. Mi povas diri sen fanfarono, ke esperanto signifas mian tutan spiritan vivon, kapitalon”, diris ouluano Allan Mehtonen, kiu festis sian 80-jaran datrevenon 14.11.2001.

– Mi estas preskaŭ denaska esperantisto. Mia patro sciis la lingvon. Kiam mi estis knabeto, li donis al mi *Kursan lernolibron* de Edmond Privat. Patro ankaŭ gvidis min en miaj unuaj paŝoj esperantaj.

Allan estas unu el plej elstaraj finnaj esperantistoj. Li estas honora membro de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj de Esperanto-societo de Oulu. Allan prezidis multajn jarojn lokan esperanto-societon kaj nun agas kiel vicprezid-

anto. Li kontaktis kaj helpis plurajn alilandajn esperantistojn estante loka delegito ekde la dua mondmilito. Ekzemple antaŭ ne longe li gvidis eksan usonan diplomaton William Vathis, kiu vizitis la urbon Oulu.

Gravas mencii, ke Allan posedas arĥivon, kiu enhavas multflanke esperanto-materialon. Li verkis esperanto-historion de Oulu, ”Sata vuotta kieltä toivomielellä”, esperantigis finnajn kantojn, skribis multe da artikoloj pri esperanto, kontrolis tradukojn, kontaktis plurajn E-elsendojn, precipe Varsovio-n.

Kio estis via posteno?

– Mi laboris 38 jarojn en la firmao Santaholma, ĉefe en Oulu, sed kelkajn jarojn ankaŭ en Kalajoki, antaŭ ol mi pensiigis. Estis nur unu escepto. En la aŭtuno de 1948 jaro, mi laboris kun Vilho Setälä en Helsinki. Mi loĝis kaj laboris en lia hejmo en Käpylä. La nomo de lia firmao estis *Eldono Vilho Setälä*. Mia tasko estis zorgi pri librotenado, kontoj kaj mendoj. Mi pagis kaj poŝtigis. Tiu fazo estis tre mallonga. Do, mi revenis al mia patra hejmo kaj mi ricevis saman kontoristan postenon kiel antaŭe en la firmao Santaholma.

Vi enamiĝis esperante?

– Jes. Mi deziris partopreni esperanto-movadon. Mi vizitis kongresojn en Malmö (1948), kaj en Oslo (1952). La tria estis en Varsovio 1959. Temis pri jubilea kongreso, centjara naskiĝdatreveno de *Zamenhof*. Antaŭ mia vojaĝo al Varsovio, mi korespondis kun polino, fraŭlino Stanislawa Nowak. Dum la kongreso ni restis kune kaj mi vizitis ŝian hejmon en Lodzo. Poste (1960) Stanislawa venis al Oulu kaj ni geedĝiĝis.

– Unue nia hejma lingvo estis esperanto, poste



Allan kaj Stanislawa Mehtonen enamiĝis esperante. Nun Allan festis sian 80-jaran datrevenon en sia hejmurbo Oulu.

Aikamuodoista

Kaikilla meillä on tehtäviä, jotka lykkäytyvät päivä päivältä. Niihin sopii hyvin lause *Ni faros tion iam*, kyllä se joskus vielä tehdään. Se on futuuri, jonka tunnus esperanton verbeissä on aina *o*. Me kaikki lykkäämme vaikeita tehtäviä. *Ni ĉiuj prokrastas malfacilajn taskojn*, preesens, tunnus *a*. Mutta toivottavasti tulee sekin päivä, että homma on hoidettu: *Ni faris tion*, preteriti, tunnus *i*. *Ni faris* on esperanton tapa sanoa teimme, olemme tehneet, olimme tehneet, ja sitä ei sanota imperfektiksi, koska se voi vastata myös perfektiiä ja pluskvamperfektiiä.

Epäuskoinen suomalainen pakostakin empii, kun hänen pitäisi sanoa jotain, missä hänellä suomessa on perfektii tai pluskvamperfektii. Ole kuitenkin luottavainen ja sano rohkeasti näin:

Neĝas de mateno. Aamusta asti on satanut lunta.

Kiam vi naskiĝis? Koska olet(te) syntynyt?

Mi naskiĝis en 1980. Olen syntynyt..

Ni loĝas ĉi tie de 1995. Olemme asuneet täällä vuodesta 1995.

La domo estis konstruita en 1994. Talo on rakennettu vuonna 1994.

De longe mi ne vojaĝas eksterlanden. Pitkään aikaan en ole käynyt ulkomailla.

pli kaj pli la finna. Ankaŭ miaj infanoj, *Eeva kaj Paavo*, scias esperanton lerninte ĝin hejme.

Vi plu havas multe da internaciaj kontaktoj?

– Mi havis, sed nun situacio bedaŭrinde estas tia, ke multaj miaj korespondamikoj mortis aŭ malfortiĝis. Tamen mi ricevis ĉi-jare kelkdekojn da leteroj de miaj eksterlandaj amikoj.

Kiujn aliajn okupiĝojn vi havas?

– Somere mi volonte ekskursas. Mi ŝatas akvon kaj sunvarmon. Naĝado kaj boatado estas miaj ŝatataj okupoj. Vintre plaĉas al mi ankaŭ skiado. En vintraj vesperoj mi ŝatas ludi mandolinon, precipe polajn kaj finnajn popolkantojn, diris Allan. (ER)

De longe mi ne vojaĝis eksterlanden. ..en ollut käynyt...

Ekde la morto de mia patro Panjo vivas sola. Isän kuolemasta asti äiti on ollut yksin.

Jos luit tarkkaan, niin ehkä ihmettelit, miksi oli *ni loĝas* mutta *mi naskiĝis* ja *la domo estis konstruita*. Hyvä että huomasi! *Ni loĝas ĉi tie de 1995* tarkoittaa, että yhä asumme täällä, *mi naskiĝis* tarkoittaa, että synnyin, minut synnyttiin, ja se tekeminen on jo päättynyt! Samoin talon rakentaminen päättyi jo 1994. (Jos sanotaan että *La domo estas konstruita el brikoj*, niin se voi tarkoittaa, että talo on tehty tiilestä tai että talo rakennetaan tiilestä.)

Tulet vallon hyvin toimeen ilman seraavia monimutkaisempia verbirakennelmia, mutta niihinkin saa tutustua.

Ana estis dirinta = Ana ĵus diris. Anna sanoi juuri/oli juuri sanonut

Erik estis respondonta = Erkki aikoi vastata/oli aikonut vastata

Mi estas telefononta = Mi tuj telefonos. Soitan heti/kohta

Ni estos veturantaj = (jollakin annetulla hetkellä tulevaisuudessa) olemme menossa/matkal-la

Ni estos veturintaj = (jollakin annetulla hetkellä tulevaisuudessa) olemme juuri päässeet matkalta.

Ja otetaan vielä konditionaali.

Ĉiuj komprenus, se iu sufiĉe bone klarigus la aferon. Kaikki ymmärtäisivät, jos joku tarpeeksi hyvin selittäisi asian.

Ĉiuj estus komprenintaj, se iu estus klariginta. Kaikki olisivat ymmärtäneet, jos joku olisi selittänyt.

Jälkimmäisen voi sanoa myös näin: *Ĉiuj komprenintus, se iu klarigintus*.

Ĉu vi komprenis? Ymmärsit(te)kö? Oletteko ymmärtäneet? Oletko ymmärtänyt?

Mi esperas, ke estas klare.

Saliko

Novaj homoj al la ŝlosilaj UEA-oficoj

Trevor Steele! Tio estas la nomo de la persono, kiu kunordigos ekde la 1-a de januaro 2002 la laboron de la Centra Oficejo de UEA, la plej granda kaj la plej grava en la mondo profesia E-stabejo. Li estas aŭstraliano, Esperantuje plej bone oni konas lin pro la stile kaj enhave bonegaj E-verkoj kaj pro multlanda E-instruado.

Oficiale la ofico nomiĝos Aganta Ĝenerala Direktoro, ĉar pro la subiteco de la demisio de la antaŭa Ĝenerala Direktoro kaj la malfrua apero de la septembra numero de "Esperanto" kun anonco pri la vaka posteno, la estraro de UEA ne havis tempon por elektado.

Same ekde la januara numero de 2002-a jaro, la revuo "Esperanto" havos novan redaktoron. La legantoj en 119 landoj ekde tiam ricevos informojn kaj artikolojn, elektitajn kaj redaktitajn de Stano Marček el Slovakio. Lia antaŭa redaktora sperto varias de "Esperantisto Slovaka" kaj "Esperantista Vegetarano" ĝis "Heroldo de Esperanto", la agada sperto – de la fondo de la slovakia junulara sekcio de TEJO ĝis manaĝerado de profesia slovakia rok-grupo "Team", vendinta unu milionon da diskoj, kaj kiu, dank'al li, kantis ankaŭ en Esperanto.

Stano ne transloĝiĝos al Roterdamo, sed redaktos la revuon de Slovakio.

La antaŭa redaktoro Istvan Ertl ankoraŭ dum kelkaj monatoj restos en la CO kaj helpos al Stano Marček glate transpreni la informfluan.

Andrej Grigorjevskij, estrarano de UEA
1.12.2001

Buller gvidos instituton en Finnlando

Osmo Buller, kiu forlasos la oficon de ĝenerala direktoro de UEA fine de februaro 2002, fariĝos direktoro de Päätalo-Instituto, kies sidejo estas en Taivalkoski, naskiĝloko de la populara finna verkisto Kalle Päätalo (1919-2000) kaj de Buller mem.

Päätalo-Instituto organizas staĝojn pri beletra verkado k.a. aktivaĵojn pri lingvo kaj literaturo. Lastatempe ĝi etendis sian agadon ankaŭ al Rusio kaj Svedio por kultivi la finnan lingvon tie. Pasintjare ĝi aldonis Esperanto-branĉon al sia fabelkonkurso por infanoj. La instituto apartenas al fondaĵo, en kiu partoprenas i.a. la municipoj de Taivalkoski kaj Tampere, kaj Gummerus, eldonisto de la verkoj de Päätalo (kaj en 1904 ankaŭ de la unua lernolibro de Esperanto por finnoj).

GK de UEA N-ro 139 (2001-11-16)

Stafeto por la redakcio de Kontakto

Kontakto havos ekde 2002 novan redaktoron, Eugenia (Ĵenja) Zvereva, 23-jara profesia ĵurnalistino el Kievo. La retadreso de Kontakto restos la sama, <kontakto@esperanto.org>. Post du semajnoj la retadreso transiros al Ĵenja. La poŝta adreso de Kontakto estas ekde tuj: Kontakto, p/k 89, UA-01030 Kiev-30, Ukrainio.

D-ino Sabira Ståhlberg kore dankas pro la kunlaboro kaj subteno al Kontakto dum sia redaktoreco.

Heroldo komunikas n-ro 145

Retlisto por la Finnlanda Esperantomovado

Nun la Finnlanda Esperantomovado havas sian propran retliston. La listo EAF-agadas ĉe yahoo-groups.com estas daŭra kunsido inter anoj de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj aliaj esperantistoj kiuj subtenas la progreson de la Esperanto en Finnlando.

EAF-agadas estas listo pri kaj por Esperanto-agado en Finnlando. Tio signifas ekzemple ke vi per la listo povas informi pri via klubkunsido, pri mencio de esperanto en gazeto kiun vi legis, pri via partopreno en interesa renkontiĝo aŭ pri alilanda gasto. Vi povas disvastigi viajn ideojn kaj demandi konsilojn de aliaj.

Ĉiuj anoj de EAF-agadas ricevos viajn ret-

mesaĝojn kaj vi ricevos ĉiujn kiujn la aliaj anoj sendas al la listo. La ĉefa lingvo de EAF-agadas estas Esperanto, sed fojfoja uzo de aliaj lingvoj estas permesata. Ekzemple, se vi trovis interesan finnlingvan artikolon pri Esperanto estas nature ke vi citas ĝin finnlingve.

Kiam la listo jam funkciis dum iom da tempo la estraro de EAF pritaksos ĝian sukceson. Nia strebo estas ke ĉiu povu senti sin bonvena en la listo, ankaŭ homoj kiuj ne tre spertas pri ret-poŝto.

Kiel aliĝi? Jen du alternativaj manieroj:

– Sendu malplenan retmesaĝon al [<EAF-agadas-subscribe@yahoogroups.com>](mailto:EAF-agadas-subscribe@yahoogroups.com) (Yahoo-groups aŭtomate sendos al vi anglalingvan mesaĝon kun peto konfirmi ke vi volas aliĝi al EAF-agadas. Respondu al la mesaĝo sen aldonaj vortoj! Poste vi ricevos mesaĝon titolitan Welcome to EAF-agadas, kiu enhavas esperantlingvan bonvenigan mesaĝon.)

– Sendu aliĝpeton al lista kunordiganto [<anna.ritamaki@kolumbus.fi>](mailto:anna.ritamaki@kolumbus.fi) (kaj mi aligos vin).

Bonvenon al EAF-agadas!

Anna Ritamäki

Kunordiganto de la listo

Ĉu vi konas elstarigindan aganton?

La estaro de EAF pasintjare revekis la tradicion atenti pri elstaraj atingajoj de la pasinta jaro per premio al grava Esperanto-aganto. En Vintraj tagoj en Hämeenlinna la premion ricevis Riitta Hämäläinen pro sia talenta kaj sindediĉa laboro por Kultura Esperanto-Festivalo 2000.

Nun EAF volas daŭrigi la tradicion nomumante ankaŭ aganton de la jaro 2001. Informu nin pri gravaj agadoj kaj gravaj agantoj, kies kontribuoj dum la nuna jaro kontribuis al la progresigo de Esperanto. La proponoj ne devas esti formalaj tekstoj. Sufiĉas ke vi, prefere antaŭ februaro, atentigas al estrarano ke vi opinias ke iu meritas tian premion.

Anna Ritamäki

Vicprezidanto de EAF

Sendependa Arta Literatura Konkurso

1. Poezio originala, 2. Prozo originala, 3. Parodio, 4. Artikolo aŭ eseoj.

Pli pri la konkurso vi trovas ĉe:

[<http://konkurso.port5.com/#opoezio>](http://konkurso.port5.com/#opoezio)

Tekstoj ĝis la 31-a de januaro 2002.

Originalaj Rakontoj 2002

Eldonejo KLEKS eldoninte en 2001 kolekton de 34 originalaj rakontoj de 30 esperantaj verkistoj el 5 kontinentoj planas eldoni por venonta jaro novan samtipan libron. Jen la detaloj pri la RAKONTARO 2002.

Kio? – Proponu nur originalajn kaj interesajn rakontojn, ne pli ol 7 paĝajn.

Kiom? – unu aŭ pli.

Kiam? – sendu ilin aŭ ĝin nun, sed ne malpli frue ol ĝis 31.12.2001.

Kien? – al retadreso:

Georgo Handzlik: [<handzlik@kleks.pl>](mailto:handzlik@kleks.pl)

Tomasz Chmielik: [<dtch@wp.pl>](mailto:dtch@wp.pl)

Eventuale helikpoŝte al: Eldonejo KLEKS, PL-43-346 Bielsko-Biala, ul. Braterska 41, Pollando.

Kiel? – tekstoj rete nur en x-sistemo.

Biografieto: Kun la teksto nepre sendu vian biografieton en ne pli ol 110 vortoj. Por minimume unuigi la biografietojn bv. menciui en ĝi:

1. Nomojn familian kaj personan (substreku la familian)

2. Ian klarigon pri la lando kiu vin koncernas (ekz: italo loĝanta en Svedio)

3. Naskiĝjaro

4. Kion vi ŝatas fari en via libera tempo.

La libro planata por UK 2002, La aŭtoroj estos honorigataj per diplomoj, verdaj laŭroj kaj krome ricevos aŭtoran ekzempleron.

La libro estas preparata sub aŭspicioj de Esperantlingva Verkista Asocio kaj kunlabore kun Esperanta Redakcio de Pola Radio.

Georgo Handzlik

Tarinoita kielten oppimisesta

Kirjoita tarina tai kertomus, muistelu tai vaikkapa opettajalle kirjoitettu kirje kielten opiskelusta ja oppimisesta. Kerro oppimisen iloista ja onnistumisista, oppituntien kulusta ja opitun kuulusteluista, synkemmistäkin puolista. Kuvaa opiskelun pieniä niksejä ja menetelmiä, toiveita, tavoitteita ja tuloksia. Kirjoita aikuisiän kielikursseista ja opintopiireistä, kielten oppimisesta työssä ja käytännön elämässä. Kirjoita myös kokemuksista matkoilla, kun kielitaidon rajat tulevat vastaan.

Kansanvalistusseura odottaa omakohtaisia tekstejä, tarinoita ja tietoa kielten oppimisesta ja opiskelusta Suomessa.

Kilpailu on kaikille avoin. Kilpailuteksti tulee kirjoittaa jollakin kotimaisella kielellä. Sen on oltava julkaisematon ja pituudeltaan korkeintaan 15 ns. normaaliliuskaa tai 30 000 merkkiä. Aivan lyhyetkin tekstit otetaan huomioon. Otsikointi on vapaa.

Tekstin voi lähettää nimellä tai nimimerkillä, jolloin muistitiedot lähetetään suljetussa kirjekuoressa. Yhteystiedot ja syntymäaika tulee mainita nimen yhteydessä. Kilpailijan, joka ei halua tekstiään julkaistavaksi tai tutkimuskäyttöön, tulee mainita siitä erikseen. Töitä ei palauteta.

Kilpailun 1. palkinto on 4000 mk, 2. palkinto 3000 mk ja 3. palkinto 2000 mk. Lisäksi jaetaan kolme 1000 markan tunnustuspalkintoa. Palkintosumma voidaan jakaa myös toisiin.

Arvostelu perustuu kirjoittamisen tason lisäksi tekstien puhuttelevuuteen ja sisällön arvoon kielten oppimista koskevan tiedon välittäjänä.

Tulokset julkistetaan toukokuussa 2002. Sen jälkeen tekstit luovutetaan Jyväskylän yliopiston soveltavan kielientutkimuksen keskuksen käyttöön.

Lähetä kilpailutyö 31.1.2002 mennessä osoitteeseen kansanvalistusseura, Museokatu 18 A 2, 00100 Helsinki. Kuoreen merkintä ”Tarinoita”.

Lisätietoja saa puhelimitse: 09-5491 8800, tai netitse <info@kvs.fi> ja <www.kvs.fi>

Esperantoliiton Talvipäivä-kalenteri 2002-2003

Mikkeliläiset esperanton harrastajat ovatideoineet ja toteuttaneet Esperantoliitolle Talvipäiväkalenterin, joka on voimassa Mikkelin Talvipäivistä seuraaviin Talvipäiviin. Kalenterissa on kaikki juhlapäivien nimet esperantoksi sekä lisätietoa esperantoa osaamattomille suomeksi. Jokaiselle kuukaudelle on oma kuvansa ja kalenterin sivumäärä on 15. Kalenteria saa ostaa viimeistään Talvipäiviltä Mikkelissä. Mutta sitä voi tilata jo heti Elli Hussolta. Esperantolehden taittoon mennessä ei ole vielä tarkkaa hintaa tiedossa, koska kalenteria parhaillaan viedään painoon. Sen hinnaksi ei kuitenkaan tule 50 mk:aa enempää (+postikulut). Tarkan tiedon kalenterin hinnasta saat tilatessasi kalenterin Elli Hussolta, osoite Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkelä, puh. (050) 568 0145.

Esperanton alkeis- ja jatkokurssi 1. – 5.7.2002

Esperanto on kansainvälinen kieli, jota käyttää arviolta miljoona ihmistä yli sadassa maassa. Kielen pohjana on pyrkimys ystävyiden ja ymmärtämisen lisäämiseen erikielisten ihmisten kesken. Esperanton kieleen liittyy myös oma monipuolinen kulttuurinsa. Esperanton johdonmukaisuus ja kansalliskieliä selkeämpi rakenne mahdollistavat kielen omaksumisen lyhyessäkin ajassa. Alkeiskurssilla tutustutaan kielen perusteisiin ja se antaa hyvät valmiudet jatko-opiskeluun itsenäisesti tai ryhmässä. Jatkokurssi on tarkoitettu kieltä jo jonkin aikaa käyttäneille ja kielen alkeet joskus oppineille. Alkeiskurssilla on opettajana Sylvia Hämäläinen ja jatkokurssin opettaja on Atilio Orellana Rojas (Argentiina/Hollanti). Kurssit järjestetään yhteistyössä Suo-

men Esperantoliitto ry:n kanssa. Viiden päivän kurssien hinta on majoituksen mukaan 249 • (1hh, hotellitasoinen), 215 • (2hh, hotellitasoinen), 198 • (1hh, retkeilymajatasoinen) tai 182 • (2hh, retkeilymajatasoinen. Hintaan sisältyy majoitus, opetus, aamiainen, lounas, päiväkahvi ja iltatee päivittäin sekä viimeisenä iltana juhlaillallinen.

Tiedustelut ja ilmoittautumiset:

Valamon kansanopisto, Valamontie 42, 79850 Uusi-Valamo. Puh. (017) 5701 400 (klo 9 – 15). S-posti: <opisto@valamo.fi>

*Valamon kansanopisto:
Kurssi- ja linjaesite 2002*

Eŭropa Esperanto-Unio invitas al Verono

La 5a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso okazos en Verona, en Norda Italio, 23-28 aŭgusto 2002 kun la temo: "Efektiva lingva egaleco: rajto de la Eŭropanoj."

EEU esperas allogi pli da partoprenantoj ol kutime ĉar la Universala Kongreso okazos ekster Eŭropo en 2002, en Fortaleza, Brazilo. Se troviĝos intereso pri komuna vojaĝo ni eventuale komencos peri la kotizojn en Finnlando. Momenta kunordiganto en Finnlando estas Anna Ritamäki (kontaktinformoj p. 2), kiu tamen malverŝajne mem partoprenos la kongreson.

Rete troviĝas aliĝilo en la PDF-versio de Eŭropa Bulteno n-ro 17, kiun vi povas trovi en <<http://lingvo.org/eo.html>>.

Organiza Komitato: Verona Esperanto-Grupo, CP 1616, 37100 Verona, Italio, retpoŝto: <esperantoverona@adriacom.it>

Eŭropa Esperanto-Unio estas neformala asocio, kiu kunordigas la agadojn de la landaj asocioj de UEA en EU-landoj. Ĝi okupiĝas specife pri kontaktoj kun Eŭropaj instancoj, sed ankaŭ pri okazigo de komunaj kongresoj de kelkaj membroasocioj (kiel la planata en Verono), ofte kun abunda programo.

Suomen Esperantoliiton Talvipäivät 23.-24.03.2002 Mikkelissä

Ilmoittaudun talvipäiville:

Nimi _____

Osoite _____

Puh/fax/s-posti _____

Ilmoittautumismaksu

- 31.01.2002 saakka 12 • _____
- 28.02.2002 saakka 16 • _____
- 1.3. jälkeen 20 • _____

Puoli maksua FEJOn varsinaisilta jäseniltä.

Kokouspaketti

- 56 • (2hh, ruokailupaketti) _____
- 74 • (1hh, ruokailupaketti) _____
- 33 • (ruokailupaketti) _____
- 24/40 • (lisäyö pe-la 2hh/1hh) _____

Maksan _____ • EAF:n tilille

Toivomuksia majoituksen ja ruokailun suhteen:

- Olen kiinnostunut vaatimattomasta yhteismajoituksesta.

Lähetä ilmoittautumisesi osoitteella:

Suomen Esperantoliitto ry.

Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Maksut EAF:n tilille: Sampo 800017-230825

TERVETULOA!

Vintraj Tagoj de EAF
23.-24.03.2002 en Mikkeli

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj:

Nomo _____

Adreso _____

Tel/fakso/retpoŝto _____

Aliĝkotizo

Ĝis 31.01.2002 12 • _____

Ĝis 28.02.2002 16 • _____

Ekde 1.3.2002 20 • _____

Duono por ordinaraj membroj de FEJO.

Kunvena paketo

56 • (2-lita ĉ, manĝopaketo) _____

74 • (1-lita ĉ, manĝopaketo) _____

33 • (manĝopaketo) _____

24/40 • (kroma nokto 2/1-lita ĉ.) _____

Mi pagas _____ • al la konto de EAF.

Deziroj pri loĝado aŭ manĝoj:

Mi interesiĝas pri modesta amasloĝejo.

Sendu la aliĝilon al:
Suomen Esperantoliitto ry.
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Pagoj al la konto de EAF:
Sampo 800017-230825

BONVENON!

Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando

23.-24.3.2002 Mikkeli

**Literaturo – plupera
kaj novkrea forto**

La sekvaj Vintraj tagoj okazos en Mikkeli, kiu estas la ĉefurbo de la gubernio Orienta Finnlando. La urbo Mikkeli estas fondita en 1838 sed en la regiono estis loĝantoj jam antaŭ la jaro 1000, kiel montras ekz. la vestaĵoj kaj ornamaĵoj trovitaj en Tuukkala kaj Visulahti. La nomon

Suomen esperantoliiton talvipäivät

23.-24.3.2002 Mikkeli

**Kirjallisuus – ajatuksia
välittävä ja uusia luova
voima**

Seuraavilla talvipäivillä tapaamme Itä-Suomen maakunnan pääkaupungissa Mikkelissä. Mikkelin kaupunki on perustettu vuonna 1838 mutta asutusta seudulla on ollut jo 1000-luvulle tultaessa, esim. Tuukkalan ja Visulahden rautakautiset löydöt sisältävät pukuja ja koruja. Nimensä

Mikkeli (svede S:t Michel) la loko ricevis en la 16a jarcento laŭ la sanktulo Mikaelo. De la 20a jarcento siajn spurojn lasis la militaj jaroj kaj marŝalo Mannerheim, kies trajnvagono nun staras en la stacidomo. Pliaj informoj pri la urbo troviĝas en <http://www.mikkeli.fi>.

La programo de la Vintraj tagoj koncentriĝos ĉiŝoje al literaturo. La Esperanta literaturo estas grava elemento en la konstruo de la lingvo. Ĝi ankaŭ estas la plej evoluita parto de nia kulturo. Vi aŭdos poemojn, ankaŭ kantitajn poemojn, prezentojn, prelegojn kaj vi mem povos prezenti vian plej ŝatatan Esperantan libron. Kunprenu libron kaj ekvojaĝu en la literaturan mondon! Nia literatura ĉefĉiĉerono estos *Aleksander Korĵenkov*, eldonisto kaj redaktoro el Ruslando.

La loko de la aranĝo estas Suomen Nuorisopisto (adreso: Paukkulantie 22, 50170 Mikkelii). Loĝado estas en unu- aŭ dultitaj ĉambroj kaj

la prezo inkluzivas matenmanĝon. La kunvena paketo krome inkluzivas du lunĉojn, du kafojn kaj simplan vespermanĝon. La aranĝo komencos per lunĉo sabate kaj finiĝos per kafo dimanĉe ĉ. la tria posttagmeze. Dimanĉe antaŭtagmeze okazos la jarkunveno de la asocio. Eblas ankaŭ alveni jam vendrede sed necesas antaŭanonci tion plejble frue.

Pli detala programo aperos en Esperantolehti 1/2002 sed jam nun eblas aliĝi. Bv. sendi la ĉikunan aliĝilon al la oficejo de EAF (Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki). Se vi havas demandojn pri la Vintraj tagoj, vi povas kontakti kun *Päivi Saarinen* (loĝado kaj aliaj praktikajoj) aŭ *Anna Ritamäki* (programeroj), bv. vidi kontaktinformojn sur la paĝo 2. Ankaŭ indas sekvi la informojn en la retejo de la asocio <http://www.esperanto.fi>.

Mikkeli sai 1500-luvulla Pyhän Mikaelin mukaan. Viime vuosisadan historiasta omat jälkensä ovat Mikkeliiin jättäneet sotavuodet ja Marsalkka Mannerheim, jonka käytössä olleen juna-vaunun kävijä huomaa jo rautatieasemalla. Lisätietoja kaupungista on osoitteessa <http://www.mikkeli.fi>.

Talvipäivien ohjelmassa keskitytään tällä kertaa kirjallisuuteen. Esperanton kirjallisuus on tärkeä osa-alue kielen rakentamisessa. Se on myös kulttuurimme kehittynein alue. Tulette kuulemaan runoja, myös laulettuina, esittelyjä ja esitelmiä, ja voitte myös itse esitellä rakkaimman esperantokirjanne. Kirja kainaloon ja matkaan kirjallisuuden maailmaan! Pääoppaanamme toimii *Aleksander Korĵenkov*, kustantaja ja toimittaja Venäjältä.

Kokouspaikkamme on Suomen Nuorisopisto (osoite: Paukkulantie 22, 50170 Mikkelii). Majoitusta varten on varattu yhden ja kahden

hengen huoneita, joiden hinta sisältää aamupalan. Kokouspaketti sisältää lisäksi kaksi lounasta, kaksi kahvia ja iltapalan. Talvipäivät on tarkoitus aloittaa lounaalla lauantaina ja päättää iltapäiväkahvilla sunnuntaina n. klo 15. Sunnuntaina aamupäivällä päätämme yhteisistä asioistamme vuosikokouksessa. Saapuminen jo perjantaina on myös mahdollista, mutta edellyttää etukäteisilmoitusta hyvissä ajoin.

Tarkempi ohjelma ilmestyy Esperantolehdessä 1/2002, mutta ilmoittautua voi vaikka heti. Lähetä oheinen ilmoittautumislomake Suomen Esperantoliiton toimistoon (Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki). Mikäli haluat kysyä lisää talvipäivistä, otathan yhteyttä *Päivi Saariseen* (majoitus yms. käytännön asiat) tai *Anna Ritamäkeen* (ohjelmaan liittyvät asiat). Molempien osoitetiedot löytyvät Esperantolehden sivulta 2. Myös liiton Internet-sivuilta osoitteesta <http://www.esperanto.fi> löytyy lisätietoja.

Al lingva demokratio!

Alvoko al la membroj de UEA/TEJO/ILEI

*Karaj membroj (kaj ne-membroj)
de UEA/TEJO/ILEI,*

dum la Universala Kongreso en Zagrebo la komitato de UEA aprobis novan labor-planon kaj komisiis nin esti speco de "garantia komisiono", kiu certigos, ke la labor-plano estos kunlabore plenumata de la membroj de niaj tri organizaĵoj.

La nova labor-plano emfazas la jenajn prioritatojn:

- ◆ informado ◆ instruado ◆ utiligado
- ◆ plijuniĝo ◆ tutmondiĝo ◆ profesiiĝo

Ili estas en si mem klaraj, kaj vi povas detale legi en la labor-plano mem, kiel ili estas kompreneblaj.

Ĉu ni bezonis novan labor-planon komence de la 3-a jarmilo? La respondo estas, laŭ ni, jes! Sekve de tio, kion ni ĉiuj faris sub la flago de la "Kampanjo 2000", ni nun devas turni nian atenton al la stato de Esperanto en la mondo, kaj reĝi movado, kiu parolas al la mondo, en maniero, kiun la mondo komprenas (informado), kiu instruas la lingvon kaj la movadon ankaŭ per la lastaj metodoj kaj teknikaj rimedoj (instruado), kiu utiligas Esperanton por la normalaj bezonoj de la vivo (utiligado).

Tiaj agadoj estu farataj kun atento al la junularo, esperantista kaj neesperantista, al la tutmonda dimensio de nia agado (por ke ne restu landoj sen esperantistoj) kaj al la uzado de la profesiaj talentoj de niaj membroj.

Unu lasta afero devas esti klara al ĉiuj: ni ne bezonas konkurenci kaj batali inter ni. Ni estas ĉiuj laborantoj por la sama idealo preter kelkfoje tro rigidaj asociaj limoj. La labor-plano, kiun vi legos, emfazas la rolon kaj de UEA kaj de TEJO kaj de ILEI, kaj de ĉiuj aliaj esperantistaj asocioj, kaj ni ŝatus en ĉiuj landoj vidi kunlaboron, eĉ se kun la bezonata memstareco de ĉiu organizaĵo.

Ankaŭ la titolo de ĉi tiu komunikado kaj de la laborplano "Al lingva demokratio!" ne bezonas klarigon. Ĝi tre klare diras, kiu estas la finfina celo de nia laboro.

Ni faros nian komunan eblon por helpi vin kaj ni dankas vin pro viaj estontaj klopodoj.

Renato Corsetti, prezidanto de UEA

Holger Boos, prezidanto de TEJO

Mauro La Torre, prezidanto de ILEI

Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA

PS. Ekzempleroj de la laborplano estas haveblaj ĉe: Renato Corsetti, Via del Castello, 1, IT-00036 Palestrina, Italujo, <renato.corsetti@esperanto.org>



Anna Ritamäki (kun la oficiala lingvotaga viziero), Riitta Hämäläinen kaj Patrik Austin deĵoris en la Esperantobudo. (Foto: AEGEE)



Societo Nino Runeberg revivigota

Societo Nino Runeberg (SNR), fondita en la 1980-aj jaroj laŭ la iniciato de Osmo Buller, dormis kelkajn jarojn “rozulinan dormon”. Ĝia membraro dum jaroj iom post iom malgrandiĝis kaj dum la lastaj kelkaj jaroj neniu aliĝis al la societo. La estrararo de EAF intencas nun vekti la societon, sed por fari tion necesas denove pri-skribi la societon.

Societo Nino Runeberg estas la finna ekvivalento por Societo Zamenhof de UEA, do la societo de subtenantoj de EAF. Por aliĝi la societon oni pagas duoblan jaran kotizon de EAF. Nun estas intenco aranĝi ion specialan por la societanoj ĉiujare dum Aŭtunaj aŭ Vintraj Tagoj de EAF. Kion tio signifas, estas ankoraŭ ne decidita, sed io certe jam okazos en Mikkelo dum Vintraj Tagoj en marto.

La societo honorigas per sia nomo al Hjalmar Johannes ”Nino” Runeberg (1874-1934), kiu

estis la iniciatinto de EAF kaj ties unua prezidanto kaj honora membro. Li estis ankaŭ la unua finna kongresano partopreninte la unuan UK:n en Bulonjo-sur-Marco 1905. Li estis krome ekz. la iniciatinto de Steleto, la societo de blindaj esperantistoj en Finnlando kaj de la helsinka klubo Polusstelo.

Do, se vi volas aparte subteni la agadon de EAF, tiam aliĝo al Societo Nino Runeberg estas agrabla kaj facila maniero montri tion. La estraro dankeme bonvenigas ĉiujn aliĝojn. Ĝis la jarkunveno validas la nuna jarkotizo de EAF kaj tiel la aliĝkotizo de SNR estas 200 markoj (33,64 eŭroj). Membroj de SNR ne nepre devas esti esperantistoj nek individuaj membroj de EAF. Tiel kiu ajn, kiu simpatias la agadon de EAF kaj Esperanto-movadon, povas fariĝi ĝia membro.

La Estraro

Esperanto videblis kaj aŭdeblis dum la lingvotago

La studenta organizaĵo AEGEE organizis lingvofoirojn en pluraj eŭropaj urboj la 26an de septembro 2001, ankaŭ en Helsinko, kie la Esperanto-budo montriĝis populara, eble la plej populara inter la dudeko da lingvoj prezentitaj.

La deĵorantoj *Anna Ritamäki*, *Riitta Hämäläinen*, *Patrik Austin* kaj *Jukka Vaijärvi* kolektis pruvilojn pri 53 vizitoj. Tiom da estis la partoprenoj en la instige facila konkurso kiun antaŭpreparis Katja Lampinen. Unu feliĉulo gajnis Dolcxamar-kompaktdiskon. La 12 kiuj per kruco montris sian emon ricevi pliajn informojn jam ricevis leteron de FEJO pri aktuala junulara agado kaj pri esperantolernado.

Pluraj prenis pliajn informojn, numerojn de Esperantolehti, la broŝuron *Rakastu esperantoksi* aŭ aliajn informilojn, ekz. pri informoj interrete aŭ pri okazonta kurso. En televidilo montriĝis Mazi-kurso. Sur la muroj pendis reklamiloj

pri la sekvavendreda Dolcxamar-koncerto. Fone sonis Esperanta muziko. Patrik kaj Riitta intervjuiĝis en la loka televido ATV kaj Anna en radio, Ylen aikainen.

Inter la ofertataj provlecionoj ankaŭ troviĝis Esperanto. La duonhoro allogis dek lernantojn, proksimume saman kvanton kiel la aliaj lecionetoj.

Samvespere Jukka Pietiläinen reprezentis la esperantistojn en podia diskuto ”Ĉu lingvoscio malfermas pordojn?” en Tampere. Tio okazis kadre de la lingvotaga celebrado okazigita de Pirkanmaan kieltenopettajat ry, Tampereen oppilaitokset kaj Tampereen kaupungin opetuspalvelukeskus (lingvoinstruista asocio kaj lernejoj instancoj). La esperantistoj ricevis la peton sendi reprezentanton ĉar dum multaj jaroj okazis Esperantokurso en la laborista instituto. (Ĉi-jare al tiu kurso tamen estis maltro da aliĝintoj.)

Malpli kosta alternativo de dumviva membreco en UEA

La Komitato de Universala Esperanto-Asocio decidis enkonduki novan kategorion de dumviva membreco de la Asocio. Temas pri Dumviva Membro kun Jarlibro (DMJ). Por esti dumvive individua membro de UEA kaj ricevi ĉiujare la Jarlibron, oni pagas unufoje la 25-oblon de la MJ-kotizo (Membro kun Jarlibro), en Finnlando 25-oblon de 20 eŭroj, kio estas 500 eŭroj. (Ĝis nun nur dumviva membreco kun abonado de "Esperanto" (DM) eblis. La DM-kotizo por 2002 estas 1 250 eŭroj.)

Kompreneble Dumviva Membro kun Jarlibro povas ricevi ankaŭ la revuon "Esperanto" pagante por simpla abono: 32 eŭroj por 2002. (Eblas en posta jaro pagi la 25-oblon de la diferenco inter MA-kotizo kaj MJ-kotizo por dumvive ricevadi ankaŭ la revuon.)

Kiel individuaj membroj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (MJ-T aŭ MA-T) por 2002 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1-an de januaro 2002 (t.e. kiuj naskiĝis en 1972 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj. Individuaj membroj de TEJO ricevas sen plia pago la revuojn "Kontakto" kaj "TEJO tutmonde". Ankaŭ patronoj de TEJO ricevas tiujn revuojn kaj tiel estas proksime ligita al la junulara movado. La patrona kotizo (3-oblo de MJ) estas ne nur tre grava financa kontribuo sed ankaŭ morala subteno.

Kotizotabelo de UEA por 2002:

- Membro kun Gvidlibro (MG): 8 • (47,57 mk)
(ricevas nur la gvidlibron, la unuan parton de la jarlibro)
- Membro kun Jarlibro (MJ(-T)): 20 • (118,91 mk)
(ricevas jarlibron kaj MJ-T = MJ malpli ol 30-jara = individua membro de TEJO ricevas ankaŭ "Kontakto" 6-foje jare kaj "TEJO tutmonde" 4-foje jare)

- Membro-Abonanto (MA(-T)) 50 • (297,29 mk)
(ricevas la Jarlibron kaj la revuon "Esperanto" 11-foje kaj se MA-T, malpli ol 30-jara, ankaŭ du pliajn revuojn, kiel ĉe MJ-T)
- Dumviva Membro (DM): 1 250 • (7 432,25 mk)
(ricevas dumvive la samon kiel MA)
- **Nova kategorio:** Dumviva Membro kun Jarlibro (DMJ): 500 • (2 972,86 mk) (ricevas dumvive la samon kiel MJ)
- Patrono de TEJO (PT): 60 • (356,73 mk)
(subtena kotizo, ricevas "Kontakto" kaj "TEJO tutmonde")
- Societo Zamenhof (SZ): 100 • (594,57 mk)
(subtena kotizo aldone al membrototizo)

Revuoj perataj de la ĉefdelegito:

Revuoj de UEA-TEJO:

- Esperanto: 32 • (190,26 markoj) (sen membreco)
- Kontakto: 19 • (112,97 markoj) (sen membreco aŭ patroneco)

Aliaj revuoj:

- Scienca Revuo (organo de ISAE): 20 • (118,91 mk)
- Monato ("pri ĉio ekster Esperantomovado"): 39 • (231,88 mk) (aere +5 • /+29,72 mk)
- La Jaro (almanako por 2002): 5 • (29,73 mk)
- La Ondo de Esperanto (rusa, movada kaj kultura, 12-foje jare): 24 • (142,70 mk) (aere +4 • /+23,78 mk)
- Komencanto (rusa, 6-foje jare): 15 • (89,20 mk)
- Eventoj (hungara, dufoje monate): 34 • (202,15 mk) (aere +6 • /+35,67 mk)

Ĉefdelegito de UEA en Finnlando:

Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula, <heta.kesala@pp.inet.fi>, telefono kaj faksilo: 09-2755 528, konto en Sampo: 800029-19438 647.

Pagante indiku la celon de via pago, vian nomon kaj adreson. Se temas pri membropago indiku ankaŭ vian naskiĝdaton (tio specife gravas por personoj en TEJO-aĝo).

(La tekston kompilis Anna Ritamäki)

Maĉkomentado el Pitsinka Sport-Centro

– Estimataj spektantoj, bonan vesperon kaj bonvenon ree al halhokemaĉo inter Pitsinki kaj Hoopoo. La duontempa situacio, 8-3 por la gastteamo, ne multe promesas por Pitsinki, aŭ ĉu, Arto?

– Vere ne, Ismo. Hodiaŭ ni estas tamen vidintaj kvalitan halhokeon, en kiu ne mankas dramatikoj, kaj la sola certa afero estas, ke kio ajn povas okazi en ĉi ekscita sportarto.

– Sen pli oratori ni iras al la fina partio. La juĝanto faligas la pilkon sur la centran rondon, de kiu Miro, kapitano de Hoopoo, hokas ĝin kaj pasigas al la maldekstra atakulo Kielo... kiu ne atingas la pilkon, ĝin havas nun Pitsinki...

– Ĉu jen estus eblo por la ĉefurbanoj malvastigi la avantaĝon?

– Turo sendas la pilkon al Frida kiu ŝotas ĝin furioze aeren, sed la Hoopooa defendo blokas...

– ...sed verŝajne kontraŭregule,

ĉar la juĝanto fajfas interrompon.

– Oni ja rajtas haltigi altan pilkon permane, kiel Hoopooa centrulo Vera jen faris. Ŝajne estas la Pitsinka dekstra atakulo Sakri, kiu ricevas averton pro ofenda lingvo.

– He, ĉi ulo estas majstro pri buŝado!

– La trejnisto envokas Sakri-n, kaj el la teama benko venas Linda.

la centrulon kaj trukas la defendulon, Unto-n.

– Denove Unto estas prenunta la pilkon. Ho ve, la pitsinka defendo estas tute endorme!

– Malgraŭ ekkrioj Miro ne pludonas la pilkon, sed solumas al la golejo kaj ŝotegas – ...GOOOOOO OOOOOOOOOL!!!

– Kia revŝoto! Mi ne kredas miajn okulojn!

– Jen en la malrapidigita bildo ni vidas kiel la pilko boras la vidblokon, kaj – vi-

du! – ĝi estas gvidata de kontraŭula bastonplato rekte en la supran angulon – la golulo Krista estas tute surprizita.

– Ĉifoje Krista ne savas.

– Ŝi ne havis tempon por eĉ provi paraton!

.....

– La partia korno sonoras. Estas frakasa venko por Hoopoo, 16-7. La teamo kaj la fanoj triumfas! Kia grandioza sportevento!

teksti ja kuva: Patrik Austin

halhoke-special!

– Unu el miaj favorataj ludantoj. – Kaj la publiko ekkantas kaj frapas la manojn!

.....


– Nun falas la lasta graco minuto, dum Hoopoo antaŭas 15-7.

– Pitsinki tamen batalas ĝis la finsekundo. Kioma sportspirito! La etoso densiĝas, la fanoj intense spronas ĉiu sian teamon.

– Hoopoo repuŝas kontraŭteaman atakon kaj sturmas sangememsor! Miro driblas la pilkon, misigas

sportarto = urheilulaji
partio = erä
malvastigi la avantaĝon = kaventaa johtoa
bloki = tukkia, estää
fajfi interrompon = viheltää keskeytys
sproni = kannustaa
sturmi = ryynnätä
sor = ylös (sob = alas)
dribli = kuljettaa (palloa)
misigi = harhauttaa
truki = hämätä, naruttaa
defendo = puolustus
pludoni, pasigi = syöttää

solumi = mennä yksin, sooloilla
malrapidigita bildo = hidastettu kuva
parati = torjua
korno = torvi
loze = iisisti
Bas! = Pois tieltä! (NG)



En la bildo atakas Pitsinka Frida. La Hoopooa defendo Paavo malsukcesas bloki, sed la akra golulo Heimo kaptas – la pilko estas sekure Heime.

Gastoj el Rio de Janeiro

Dum somermeza festo mi ricevis gastojn el alia flanko de la mondo. Ĉio komencis antaŭ kvardek jaroj, kiam mi ricevis leteron de junaj gefianĉoj el Brazilo. Ili estis *Almir Ferreira* kaj tiam ankoraŭ lia fianĉino *Zilda de Souza*. En Esperantokurso ili elektis la plej ekzotikan landon, kie ili volis havi korespondadon. Tiu estis mia adreso.

Ni korespondis dum jardekoj pli aŭ malpli diligente, sed dum kelkaj lastaj jaroj pli vigne. Unuan fojon ni renkontis persone antaŭ du jaroj, kiam mi kun Marjaliisa Parpala gastis ĉe ili en Rio de Janeiro. Kaj nun estis tempo, ke miaj karaj *Zilda* kaj *Almir* venis al Finnlando.

En flughaveno de Helsinki-Vantaa mi kun *Salme Tiili* akceptis ilin. Ankaŭ *Salme* gastis ĉe familio *Ferreira* antaŭ unu jaro dum sia vagado en Brazilo. Kelkaj tagoj ili loĝis en Helsinki ĉe *Salme* kaj ni kune rigardis vidindaĵojn de nia ĉefurbo.

Trihora trajnovojaĝo al Lappeenranta estis por ili eksterordinara, ĉar en Brazilo estas tre mal-

multaj fervojoj. Ili vivas en tropika lando, kie noktoj ĉiam estas mallumaj. Pro tio la plej granda surprizo por ili estis niaj lumaj noktoj. Ĉiunokte ili ekvekiĝis dum la sunleviĝo, sed feliĉe pli poste povis daŭri dormon. Certe por ili Finnlando kaj Lappeenranta estis egale ekzotikaj kiel por ni Rio de Janeiro. En nia malgranda urbo ni pasigis trankvilan tempon rigardante la urbon kaj vizitante ĉe lokaj esperantistoj.

Ankaŭ ni vizitis en Kouvola, kie *Marjaliisa Parpala* pasigis ferion. Vespere revenante hejmen per aŭtobuso, mi aŭdis malantaŭ mi demandon: “Ĉu vi parolas Esperanton?” Tie sidis ĉina esperantisto, doktoro *Huiyuan Fan*, kiu en tiu tago flugis el Hong Kong tra Parizo al Helsinki kaj maltrafis pli fruan aŭtobuson al Lappeenranta. Pro tio ni hazarde sidis en la sama buso. Estis vere ĝoja surprizo por ni ĉiuj. Verŝajne multaj aliaj vojaĝantoj miris nian gajan, iom laŭtan renkonton kaj la lingvon, kion ni parolis. Poste nia ĉina amiko rakontis, ke aŭskultante nian parolon li miris, ĉu finna lingvo povas esti tiel simila

kiel Esperanto. Baldaŭ li tamen konvinkiĝis, ke ĝi estas Esperanto. Nun li pli ol tri monatojn laboris en Teknika Universitato de Lappeenranta.

La brazilanoj estis interesitaj ankaŭ pri



Irja Miettinen kun la foraj gastoj.

Maldekstre:

*Huiyuan Fan,
Zilda Ferreira,
Irja Miettinen,
Almir Ferreira.*

niaj najbaraj landoj kaj tial mi proponis, ke ni kune iru al Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj pasint-somere okazis en Litovio. Kelkaj miaj konatuloj volis vojaĝi kun ni, tiel nia grupo konsistis el dekunu finnoj kaj du brazilanoj. Survoje ni haltis en Tallinn, kie esperantistoj agrable gvidis nin. Vespere ni vizitis en Esperanto-Klubo de Tallinn, kie ni krom estonojn, renkontis ankaŭ tri svedajn esperantistojn.

El Tallinn al Kaunas estis tuttaga aŭtobusa vojaĝo kaj vespere ni atingis lokon de BET, belan, verdan areon de la agrikultura universitato. Partoprenantoj estis el 19 landoj, Almir kaj Zilda estis feliĉaj, ĉar ili povis konatiĝi kaj paroli kun tiom multaj diverslandaj samideanoj. Programo de BET estis bona kaj koncertoj altkvalitaj. Niaj brazilaj amikoj partoprenis ekskurson al Suda Litovio kaj vizitis la ĉefurbon Vilnius. Unu semajno bone kaj agrable pasis en Litovio.

*Irja Miettinen
(daŭrigota)*


Novajoj de Lappeenranta

Esperanto-grupo de Lappeenranta kunvenas nune en *Vapaaehtoiskeskus Kuutinkulma*, Valtakatu 23. La printempaj kunvenaj datoj: 14.1., 28.2., 11.2., 25.2., 11.3., 25.3., 8.4. kaj 22.4. lunde je la h. 18.30. En la sama loko Jorma Toropainen gvidas elementan Esperantokurson, kiun partoprenas kvin personoj. La kurso daŭros ankoraŭ novjare.

Kontaktadreso: Irja Miettinen, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta. Retpoŝto: <*irja.miettinen@wwnet.fi*>. Tel. (05) 453 0653.

Esperanto-Societo en Turku 40-jara

EST festis sian 40-jarojn la 14an de oktobro en la Verda Salono en la malnova urbocentro de sia hejmurbo Turku. Ĉeestis ĉirkaŭ 30 partoprenantoj: membroj kaj geamikoj el Finnlando. Honora gasto estis s-ro Sylvan Zaft el Usono. EST dankas pro la gratuloj!



Täyttynyt toive

<i>Äiti.</i>	– <i>Ei kai se</i>
<i>Olisit tyytyväinen.</i>	<i>ihana ihminen</i>
<i>Värikkäitä kukkia</i>	<i>ole</i>
<i>iloisia ihmisiä.</i>	<i>kuollut?</i>
<i>Laulua.</i>	<i>kysyivät</i>
<i>Soittoa.</i>	<i>kukkakaupassa.</i>
<i>Hyviä muistoja.</i>	– <i>Juuri se,</i>
	<i>vastaan.</i>

Eila Pohjonen

”Saisinko taksin Esperantotie 3:een...”

Syyskuussa ilmestyi Helsingin Sanomissa Alepan mainos (ks. kuva EL 5/2001), jossa tyttö käytti esperanton opiskelua tekosyynä päästä eroon liian innokkaasta pojasta.

Lokakuussa jo toinenkin yritys käytti esperantoa mainoksessa, jälleen humoristiseen sävyyn. Mainos oli kuultavissa Kiss FM -radio-kanavalla, ja tällä kertaa oli kyse Keiju-margariinista, jota mainostettiin teemalla ’hieman terveempään elämään’. Mainoksessa nuori mies tilaa taksia osoitteeseen Esperantotie 3. Taksikeskuksen välittäjä ei kuitenkaan suostu välittämään tilausta. Hänen mielestään kyyti on niin lyhyt, ettei mies tarvitse taksia ollenkaan: ”Kävele, poika! Tekee hyvää sinulle. Siellähän on niin kiva ilmakin.”

Lokakuuisessa City-ilmaisjakelulehdessä esperanto esiintyy Liisaleenan kolumnissa ”Kun saapuu syys”. Kyse on vuodenaikojen vertailusta. Muut vuodenajat Liisaleena tuomitsee, mutta kirjoittaa seuraavasti syksystä: ”Syksy selviytyy voittajaksi, kunhan siihen ottaa oikean asenteen. Moni vain lähtee syksyyn liian suurin saappain. Syyssuorittaja vatkaa tiistai-illat raivokkaasti afrokuubalaista ja tankkaa torstaisin veren maku suussa työväenopistossa esperantoa. Siinä on perheellä ihmettelemistä, kun kuolemanväsynyt äiskä rojahtaa joulupöytään ja sopertaa: Mi nomiĝas Kerttu-Anneli.”

ATV-kanavalla lähetettiin 26.9. Patrik Austinin ja Riitta Hämäläisen haastattelunpätkä. Aiheena oli kielimessut Helsingin yliopistossa. Haastattelijaa eivät kuitenkaan kiinnostaneet kielet yleensä, vaan ”pienet ja oudot” kielet kuten esperanto, latina tai sanskrit. Uutislehti 100:ssa ilmestyi 28.9. suurehko uutinen Dolcxamarin konsertista rock-klubi Factoryssa. Digtv:n INTO-sarjassa lähetettiin 6.11. ohjelma ”homo contedens”, kilpaileva ihminen. Ohjelmassa soitti Dolcxamar.

Helsingin Sanomissa oli Nykytaiteen museo Kiasmaan kootun Ars 01 -taidenäyttelyn aikaan, ke 26.9.2001 suomalais-saksalaisen taiteilijan Matti Braunin (s. 1968) haastattelu. Hän käyttää mielellään peiliä materiaalina. ”Seuraavaksi Matti Braun aikoo käsitellä keinotekoisia kieliiä kuten esperantoa. Minkälaisen visuaalisen muodon kielen ristiriitaisuuksia tutkiva työ saa, on vielä auki.”

Paikallis-uutisissa, joka on Jyväskylän maalaiskunnan, Toivakan ja Uuraisten yhteinen paikallislehti haastateltiin 26.9.2001 viikon kysymys -palstalla Aimo Rantasta otsikolla ”Voiko maalaiskunnassa opiskella esperantoa”. Haastattelu ei poikkeakaan kovinkaan paljon yleisestä kaavasta. Aluksi jotakin L. L. Zamenhofista, sitten ensimmäinen kohtaaminen esperanto-asian kanssa, joka oli Aimo Rantasen kohdalla Pikku Jättiläinen. Valamon kurssista mainittiin ja opintopiiristä maalaiskunnassa, johon ei kukaan valitettavasti ilmoittautunut.

Koillissanomat, Iijokiseutu ja Suomenmaa julkaisivat kukin artikkelin Pääatalo-instituutin johtajavaihdoksesta. Jokaisessa lehdessä mainittiin, että tuleva johtaja Osmo Buller on UEA:n nykyinen toiminnanjohtaja. Koillissanomissa uutinen julkaistiin etusivulla.

Suomen Kuvalehden 85-vuotisjuhlanumerossa (30.11.2001) muisteltiin euron varhaista edeltäjää, varsinaista ”esperantorahaa” spesmiloa (Sm), jonka Vilho Setälä esitteli SK:n artikkelissa vuonna 1917. ”Sen oli kehittänyt sveitsiläinen tiedemies Rene de Saussure jo vuonna 1907, alun perin esperantistien lehden ilmoituksissa käytettäväksi hintojen yhteismitaksi. Spesmilon arvo määriteltiin myös kullassa, jolloin sitä voitiin verrata muihin valuuttoihin. Yksi spesmilo oli noin 2,5 Suomen markkaa ja vaajat puoli dollaria.” Lehdessä oli myös kuva spesmilo-juhlarahoista vuodelta 1912 sekä spesmilo-sekistä, Vilho Setälän allekirjoituksella.

Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☐ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkeli, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkeli.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☐ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaūen ry. / Esperantosocieto Antaūen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Käräjätörmä 2 E 32, 33310 Tampere, ☐ andromeda@koti.tpo.fi)
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☐ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajain esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finlandaj Esperantistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☐ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☐ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2002**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
1	1.1	15.1	1.2
2	1.3	15.3	1.4
3	1.5	15.5	1.6
4	1.7	15.7	1.8
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
1/2 sivua 400 mk	1/2 sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Aŭstria Esperanto-Movado ofertas:
AT 1050 Wien, Margaretenzürtel 100/11/2

Aktoj 249 paĝoj 104,- FIM

Multaj prelegoj faritaj en la Universitato de Vieno de famaj aŭtoroj kiel Piron, Frank, Maitzen, Tonkin ktp. pri Esperanto.

Wien 48 paĝoj 45,- FIM

Gvidlibro de la bela urbo Vieno. Kolore ilustrita, en la lingvoj Esperanto, angla kaj germana.

Distra 128 paĝoj 24,- FIM

Koktelo

Humuraj parte ilustritaj kontribuajtoj. 2-a eldono.

Pri la pagmaniero ni informos vin per nia fakturo. Petu nian katalogon!

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuun alussa. Jutut 15.1.2002 mennessä Aimo Rantaselle. Venonta numero aperos en la komenco de februaro. Artikoloj ĝis 15.1.2002 al Aimo Rantanen. Osoite/adreso: PL 2, FIN-40801 Vaajakoski, puh/tel. (014) 261 438, s-posti/rete: <esperantolehti@esperanto.fi>.